

MARTO!

MARTO!

SE VI VOLAS

inde memorsoleni la heroajn martirojn de l'proletara afero,
lernigu al vi kaj al aliaj

NIAJN RUĜAJN KANTOJN

Ĉiu havigu al si la ampleksan, aranĝitan kun muziknotoj

"PROLETARIA KANTARO"

Administracio de SAT.

MANKAS BELAJ LIBROJ

en nia literaturo,

kvankam ne mankas bonaj manuskriptoj.

Ŝtopu la truojn! — Ebligu la presigon!

Kompletigo de via SAT-biblioteko estas
via afero!

PROVIZU VIN PER LA AKCIOJ DE ELDONKOOPERATIVO DE SAT

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)

no II/VI. N.o 7 (19)

Aprilo 1925



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda

Fondita en 1919

Literaturo-Scienco-Pedagogio

ENHAVO:

N. LENIN: Proletaro kaj religio. Trad. G. Dem. —
A. FIGURIN: Deveno de religio. Trad. G. P. — *ANTERO
DO QUENTAL:* Dia komedio. Vers. Trad. Ab. Ribeiro. —
UPTON SINCLAIR: Pastra mensogo. Trad. K. Fröding. —
ELIO ERENBURG: La mirakloj de dio Kabalaŝ. El-
rusigis 1516. — *S. GORODECKIJ:* Idol-ofero. Trad.
N. Nekrasov. — *MULTATULI:* Pri preĝado kaj di-kredo.
Trad. G. P. de Bruin. — *J. LEDERER:* Scienco renversas
asertojn de pastroj. Trad. — *N. MINSKIJ:* Mia kredo.
Vers. Trad. N. Vladimiroviĉ. — *A. FIGURIN:* Evoluo de
koncepto pri dio. Trad. G. P. — *NENIU:* Nokta renkonto. —
AUG. STRINDBERG: Diotimaj bonfarulinoj. Trad.
I. Jurysta. — *DAMIANO BEDNY:* Kristo reviviĝis. Vers.
Trad. S. Alekseev. — Kio estas infero? Trad. A. Levandovskij. —
L. IVN: Ruĝa geedzigo. — *SEB. FAURE:* Edukado kaj religio. Trad. — *W. DRUMMOND:* Infanoj kaj religio. Trad. — *E. SPIRIDOVIĈ:* La eksperimento de senreligia edukado.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (Rusio)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

“Ĉiu aktiva SAT-membro ne plu estu ano de iu ajn eklezio. Ĉiu SAT-ano havas la devon eduki siajn infanojn laŭ profana mondrigardo”. Tiel unuanime kontraŭ nur unu voĉo rezoluciis la IV-a kongreso de SAT en Bruselo, aŭgusto 1924.

Ne necesas multon paroli por esprimi, kiom grava estas tiu ĉi decido de la kongreso. Per ĝi estas klare starigita la kuraĝa vizaĝo de SAT-ano rekte kontraŭ ĉiuj dioj, diabloj, feoj, pastroj kaj ceteraj superstiĉaĵoj de la malnova homo. Kun ĝojo kaj kun arogo ni aperigas do tiun ĉi kajeron de “Sennacieca Revuo”, speciale dediĉatan al tiu ĉi batalo.

Bedaŭrinde, ne eblis, pro nia nesufiĉa ankoraŭ materiala bazo, fari la kajeron ti-kia ĝi estis en nia imago — dika, multepaĝa, bildoriĉa, eĉ senpaga: — multajn ricevitaĵajn artikolojn ni estis devigitaj mallongigi kaj eĉ restigi por kuŝado ĝis nova favora okazo. Tamen ni esperas, ke malgraŭ ĉiuj mankoj (ne sufiĉe detala analizo de diversaj religioj modernaj, ekz. kristana, mahometana, k. a.) la kajero kombiniĝis pli-malpli kompakta.

Ni atentigas niajn kamaradojn, ke la ideo pri specialtemaj numeroj de nia revuo montriĝis esti tre feliĉa. Ni jam aperigis du tiajn: la originalverkan kaj la antimilitan. Tiu ĉi estas ateista. Nun ni projektas jenajn: speciale *virinan* numeron, *infan-junularan* kaj *orientan*. Ni do ree invitas la tutan kamaradaron sendi siajn verkojn tiutemajn.

Sed kion skribi? Ho, kompreneble, ne pri modroboj, ne pri dolĉaj intimaĵoj kaj aliaj galantaj aferoj oni skribu por la virina “S. R.”, sed pri la socia stato de laboristino, pri ŝia lukto por la emancipiĝo, pri ŝia egaleco kun la viro, pri la problemoj de ŝia vivo... Ne sensencajn miraklofabeletojn, ne rakontojn pri cikonio kaj pri avo St. Nikolao bezonos nia infan-junulara “S. R.”, sed simplajn literaturaĵojn, kiuj pentrus al ni vivon de laborista infano, influon de sociaj okazantaĵoj sur la psikon de infano, rolon de junularo en revolucio, kaj ankaŭ niaspiritan proletarian legmaterialon por laboristaj infanoj, verecajn rakontojn pri la fakta, reala vivo... Kaj ne priskribojn de eksterordinaraj aventurojaĝoj, ne narkotizantan haŝiŝe, opie parfumodoron de la ekzotika Oriento volas reflekti nia orienta “S. R.”, sed la aŭroron de la vekigantaj popolmilionoj de Azio — per la tradukaĵoj el la originala moderna revolucia literaturo orienta, per artikoloj pri la nova Oriento kaj pri ĝia rilato al la malnova dekadenca Okcidento...

Oni aludu al ni ankaŭ aliajn bonajn kaj taŭgajn temojn.

Jenajn verkojn ni akceptis por eventuala enpresado: “Triumfo” (Barbarus) — tre bela tradukaĵo el estona lingvo; “Ŝarado” (Paegle) — kvars-cena teatraĵo tradukita el latva lingvo; “Tia kesto” (Rejzin); “Oni armas” (Frösell) — trad. el sveda lingvo; versoj tradukitaj el armena poeto Hakob Hakobjan; originalaj rememoroj pri la rusa revolucio de 1905 “Dudek jarojn antaŭe” de k-do Rjabuĥin; original-poemo “Al kara tombo” de Nora Kin.

(Daŭrigo sur la 3a paĝo de l' kovrilo)



Alaho

Sabaoto

Jehovo

Proletaro kaj religio

FRAGMENTO

N. Lenin

La tuta moderna socio estas konstruita sur ekspluatado de grandega laborista klaso flanke de eta malplimulto de loĝantaro, apartenanta al la klasoj de terposedantoj kaj kapitalistoj. Tiu ĉi socio estas sklavposedula, ĉar “liberaj” laboristoj, dum la tuta sia vivo laborantaj por kapitalo, “havas rajton” nur je tiuj ekzistorimedo, kiuj estas necesaj por vivteno de la sklavoj, produktantaj profiton, por asekuro kaj eternigo de la kapitalisma sklaveco.

La ekonomia premeĝo kontraŭ laboristoj senevite elvokas kaj naskas ĉiujn specojn de premeĝo politika, de maldignigo socia, de krudigo kaj nebuligo de la spirita kaj morala vivo de la amasoj. Laboristoj povas konkiri por si plian aŭ malplian politikan liberon en sia batalo por sia ekonomia liberiĝo, sed neniu libero senigos ilin de la mizero, senlaboreco kaj premeĝo, ĝis ne estos renversita la potenco de la kapitalo. Religio estas unu el specoj de spirita premeĝo, kuŝanta ĉie kaj ĉiuloke sur la popolaj amasoj, premitaj de la eterna laboro por aliu, per mizero kaj soleco. La senforto de la ekspluatataj klasoj en la batalo kontraŭ ekspluatistoj samtiel senevite naskas la kredon je pli bona postmorta vivo, kiel la senforto de sovaĝa homo en lia batalo kontraŭ la naturo naskas la kredon je dioj, diabloj, mirakloj k. s. Tiun, kiu dum la tuta vivo laboras kaj mizeras, la religio instruas al humiliĝo kaj toleremo en la surtera vivo, konsolante per la espero je la ĉiela rekompenco. Kaj tiujn, kiuj vivas per fremda laboro, la religio instruas al la bonfarado dum la surtera vivo, proponante al ili tre malvaloran pravigon por la tuta ilia ekspluatista ekzistado kaj vendante laŭ taŭga prezo biletojn por la enĉiela bonstato. La religio estas veneno por la popolo. La religio — estas speco de spirita brando, en kiu la sklavoj de l' kapitalo dronigas sian homecan aspekton, siajn postulojn je iom ajn inda la homon vivo.

Sed la sklavo, konsciinta sian sklavecon kaj leviĝinta al la batalo por sia liberiĝo, jam duone ĉesas esti sklavo. La moderna konscia laboristo, edukita de grandskala fabrika industrio, klerigita de urba vivo, forjetas de si kun malŝato la religiajn antaŭjuĝojn, lasas la ĉielon je dispono de pastroj kaj burĝaj bigotoj, konkirante por si pli bonan vivon tie ĉi sur la tero. La moderna proletaro okupas la flankon de l' socialismo, kiu altiras sciencan al la batalo kontraŭ la religia nebulo kaj liberigas laboriston de la kredo je postmorta vivo per tio, ke ĝi rekompencas lin por vera batalo pro la pli bona surtera vivo.

Oni ne devas limigi la batalon kontraŭ la religio per abstrakte-ideologia prediko, oni ne povas fari ĝin tia prediko, necesas tiun ĉi batalon ligi kun la konkreta praktiko de la klasa movado, direktita al forigo de la sociaj radikoj de la religio. Kial konserviĝas religio inter la neprogresintaj tavoloj de l' urba proletaro, en la vastaj amasoj de la duonproletaro, kaj ankaŭ en la amaso de kamparanaro? Pro malklereco de la popolo, — respondi burĝa progresemlulo, radikala aŭ burĝa materialisto. Sekve, for la religion, vivu la ateismo, la plej ĉefa nia tasko estas disvastigo de la ateistaj konceptoj. Marksisto diras: malvere. Tia koncepto estas supraĵa, burĝe-limigita kulturecismo. Tia koncepto nesufiĉe profunde, ne materialisme, sed idealisme klarigas radikojn de la religio.

En la modernaj kapitalistaj landoj tiuj ĉi radikoj estas precipe *socialaj*. La socia premigiteco de la laborulaj amasoj, la ŝajna plena senhelpo ilia antaŭ la blindaj fortoj de la kapitalismo, kiu kaŭzigas por la vicaj laboruloj ĉiutage kaj ĉiuhore miloble pli multe da plej teruraj suferoj, da plej sovaĝaj turmentoj, ol ĉiuj eksterordinaraj okazantaĵoj kiel militoj, tertremoj ktp., — jen en kio estas la plej profunda moderna radikoj de la religio. "La timo kreis diojn". La timo antaŭ la blinda forto de l' kapitalo, kiu estas blinda, ĉar ĝi ne povas esti antaŭvidita de la popolaj amasoj, — kiu sur ĉiu vivpaŝo de proleto kaj de eta posedulo minacas al li alporti kaj alportas "subitan", "neatenditan", "hazardan" bankrotiĝon, pereon, mizeriĝon, prostituiĝon, promalsatan morton, — jen estas tiu radikoj de la moderna religio, kiun antaŭ ĉio kaj pleje devas konsideri materialisto, se li ne deziras resti materialisto de la prepara klaso. Neniu kleriga libreto forigos religion el inter la premigitaj de kapitalisma punlaborejo amasoj, dependantaj de la blindaj detruaj fortoj de la kapitalismo, ĝis tiuj ĉi amasoj mem ellernos unuigite, organizite, plane, konscie batali kontraŭ tiu ĉi radikoj de la religio, kontraŭ la *potenco de l' kapitalo* en ĉiuj formoj.

Do ĉu sekvas el tio, ke la kleriga libro kontraŭ la religio estas malutila aŭ superflua? Ne, el tio ĉi sekvas, ke ateista propagando de social-demokratio devas esti *subigita* al ĝia fundamenta tasko: al disvolvado de la klasa batalo de la ekspluatataj amasoj kontraŭ la ekspluatantoj.

Esperantigis G. Dem.

Deveno de religio

Prahomo sciis nek religion, nek diojn. Pro la nedisvolvita tekniko kaj sekve pro sia malmulte disvolvita konscio li ne distingis sin de la ĉirkaŭanta lin naturo. Sklava dependeco de la naturo en ĉiuj rilatoj plenigis lin je timo antaŭ la naturo. Ombro, tondro, fulmo, sonoj, arbaroj timigadis lin. "Timigaĵo" estis la religio de sovaĝa homo. Kaj same nun — timo antaŭ la sponta disvolviĝo kaj pereado de la kapitalista produktado plifirmigas la pozicion de dioj en la burĝa socio.

Iu pli supera estas la disvolvigo de besto, des pli grandan parton en la agado de ĝia cerbo okupas la konscio kaj des pli malmultan lokon en ĝi okupas la instinktaj movoj. Ĉe prahomo la instinkto superregas la konscion, kaj antaŭ ĉio la instinkto de la memgardo, kiu do sur tiu ĉi evolu-ŝtupo de homo elvokas la timon.

Sed jen la homa socio atingas tiun evolu-ŝtupon, kiam aperas gvidanto, organizanto, patriarko, oni povus diri "animo de la komunumo"; kaj tiumomente aperas la koncepto pri "animo" aŭ "spirito", kiu gvidas la korpon. La "animo" laŭ opinio

de iuj sovaĝuloj vivas en la brusto, laŭ opinio de la aliaj — en la sango, en la koro, en la okuloj. Observante la dormon de homo, sovaĝulo supozas, ke la "animo" povas provizore forlasi la korpon, kaj kiam homo mortas — do la "animo" forlasis ĝin por ĉiam.

Sovaĝulo vidas en sonĝo homon jam mortintan, do li konkludas ke la "animo" estas senmorta kaj ĉe li aperas la kredo je postmorta vivo. Tiu ĉi postmorta vivo evidentiĝas al li tute simila al la vivo antaŭmorta: ja en la sonĝo aperas la "animo" en aspekto de la mortinto mem, en lia vestaĵo; ĝi parolas kaj agas tute same kiel dum la vivo. Tial la antikvaj slavaj gentoj estis entombigantaj kune kun la mortinta gvidanto lian edzinon, ĉevalon, plugilon, hejmilaron kaj manĝaĵon.

Komence prahomo supozas la "animon" ĉe bestoj, kreskaĵoj kaj jam poste ĉe si mem. La objektoj ĉirkaŭantaj lin akceptas en lia koncepto krom la korpo ankaŭ la "animon". Ne scipovante klarigi na-

DIA KOMEDIO

ANTERO DO QUENTAL

*Ĉielen brakojn siajn etendanta,
Turnante sin al dioj nevideblaj,
Homar' plendkrias: — "Ho! nekortuŝeblaj,
Servataj dioj de la sort' venkanta,*

*Nin, kial kreis vi?! Rapideganta,
Nur naskas tempo, da neestingeblaj
Dolor', luktad', krimar' neimageblaj,
Aregon nigran, en tordig' konstanta...*

*Ĉu, do, ne preferindus, en senlac'
De kio ne jam estas, de nenio,
Restadi en eterna, dorma pac'?*

*Nin, kial vokis vi, por fi-destin'?"
Sed la diar', kun plia emocio,
Demandas: — "Hom'! vi kial kreis nin?"*

(El la portugala, trad. Abílio Ribeiro)

turajn fenomenojn, prahomo trovas ilian kaŭzon en la influo de "animoj" kaj "spiritoj", kiujn li kredas supernaturaj, kiujn li igas siaj dioj kaj antaŭ kiuj li preĝas por ke ili ne malhelpu, sed helpu al li en lia batalo pro sia ekzisto.

La unuaj liaj dioj estas — bestoj. Homo ne jam distingis sin de la bestoj, ne konsciis sian superecon kaj sian forton: li do diigas la naturon sklavigantan kaj timigantan lin. Bestoj prezentas por prahomo lian nutraĵon, tial li dependas de la bestoj kaj ĉio, antaŭ kio prahomo dependas, estas de li diigata. Kaj ni vidas tutan vicon da dioj, kiuj ĉe la antikvaj popoloj havis aspekton de bestoj: egiptoj havis la bovon — Apison kaj krokodilon; ĉiuj terkulturistaj popoloj havis siajn diojn en aspekto de fiŝoj, ŝafoj, bovidoj; ĉe hebreoj en la dezerto aperas Kupra Serpento, religian kulton de serpentoj ni povas observi en Hindio; kaj, fine, eĉ la moderna kristanismo pentras al si dion — la sanktan spiriton — en aspekto de kolombo.



Sfinkso

Sekvanta ŝtupo en la disvolviĝo de religio estas apero de kelkaj homaj signoj ĉe dioj-bestoj. Ĉar la antikva homo pli bone scias aranĝon de siaj kruroj kaj brakoj (kiujn li ja povas observi, vidi), ol la aranĝon

de sia kapo (kiun li ne povas vidi), aperas komence ĉe liaj dioj-bestoj homaj brakoj kaj kruroj, kaj jam poste aperas sur la besta korpo homa kapo: Egipta diino Izido havis aspekton de virino kun la kapo de bovino; egipta Sfinkso prezentas leonon kun homa kapo kaj greka Centaŭro — estas ĉevalo kun homa trunko anstataŭ la kolo, kun homa kapo kaj brakoj. De la antikva tempo devenas ankaŭ la niksino, tiu duonfiŝo, duonvirino.

Nur post tiu ĉi ŝtupo de dioj kun duonhoma, duonbesta aspekto la homo kreis siajn diojn en aspekto de homo mem.

Prahomo, sovaĝulo en multaj siaj trajtoj memorigas infanon; kiel la lasta bezonas por konkretigi siajn konceptojn pupojn kaj ludilojn, kiujn ĝi povas palpi per fingroj, okuloj kaj lango kaj tiamaniere ekoni la ĉirkaŭantan ĝin nekompreneblan mondon de homoj, bestoj, konstruaĵoj ktp., — samtiel prahomo kaj sovaĝulo konkretigas sian dion en formo de ligna aŭ ŝtona idolo, antaŭ kiu li sin klinas kaj al kiu li portas siajn oferojn, serĉante dian humilon kaj favoron.

El A. Figurin "ABC de sendieco" trad. G. P.



La pastra mensogo

Upton Sinclair

Kiam la unua sovaĝulo vidis sian kabanon detruita de fulmofajro, li falis surprizagen pro teruro. Li ne havis koncepton pri naturfortoj, pri la leĝo de elektro: li rigardis tiun okazadon kiel agon de individua inteligento. Hodiaŭ ni legas pri feinoj kaj demonoj, driadoj kaj faŭnoj kaj satirusoj, Wotan kaj Thor kaj Vulcan, Freja kaj Flora kaj Cereso, kaj ni pensas pri tiuj ĉi kiel pri belaj fantaziaĵoj, ludproduktoj de la menso; ni forgesas la fakton, ke ili unue estis intencataj tute serioze — ke ne nur la antikvuloj kredis je ili, sed estis devigataj kredi je ili, ĉar la intelekto bezonas klarigojn pri la okazaĵoj, kaj la individua inteligento estis la sola klarigo havebla. La rakonto pri la heroo, kiu mortigas la manĝegantan drakon, estas ne nur simbolo de tago kaj nokto, de somero kaj vintro; ĝi estis senfigura klarigo de la fenomenoj, la scienco de la pratempo.

La homoj imagis supernaturajn potencojn kompreneblajn por ili. Se la fulmdio detruis kabanon, tio devis esti, ĉar ĝia posedanto estis ofendinta la dion; tial la posedanto devis paciĝi lin, uzante tiujn rimedojn, kiuj estus efikaj en la disputoj inter homoj — donacojn de viando rostita kaj mielo kaj freŝaj fruktoj, de vino kaj juveloj kaj virinoj, akompanataj de amikaj vortoj kaj gestoj de submetiĝo. Kaj kiam spite ĉion la natura malbono ne ĉesis, kiam la popolo daŭris mortadi de pesto, tiam venis la okazo de histeriaj aŭ ambiciaj personoj por eltrovi novajn manierojn penetri la menson de la dio. Aperadis sonĝantoj de sonĝoj, vidantoj de vizioj kaj aŭdantoj de voĉoj, legantoj de la internaĵoj de bestoj kaj interpretantoj de la flugo de birdoj: aperadis brulantaj arbetoj kaj ŝtonaj tabuletoj sur montpintoj, kaj inspiritaj vortoj, diktitaj al maljunaj disĉiploj sur senhomaj insuloj. Ekstis specialaj kastoĵoj de viroj kaj virinoj, instruitaj pri tiuj ĉi sanktaj aferoj; kaj tiuj ĉi pastraj kastoĵoj kompreneble emfazigis la gravecon de sia profesio, tenis sin aparte de la ordinara anaro, naturdotitaj per specialaj povoj kaj rajtigataj al specialaj privilegioj. Ili interpretadis la oraklojn en manieroj favoraj al si mem aŭ sia klaso; ili deklaris sin amikoj kaj konfidatoj de la dio, promenantaj kun li nokte, akceptantaj liajn senditojn kaj anĝelojn, agantaj kiel liaj anstataŭantoj por pardoni krimojn, disdoni punojn kaj ricevi donacojn. Ili fariĝis donantoj de leĝoj kaj de moralaj kodoj. Ili portadis specialajn kostumojn por distingigi sin, ili faradis specialajn ceremoniojn por impresi siajn disĉiplojn, uzante ĉiujn sanktajn efikaĵojn, arkitekt-arton, skulpt-arton kaj pentr-arton, muzikon kaj poezion kaj dancadon, kandelojn kaj incensojn kaj sonorilojn kaj tamtamojn —

Kaj etaĝaj fenestroj riĉornamitaj
Malklaran lumon religian disjetante.
Tie blovu la sonora orgeno
Al la plenvoĉa horo malsupre,
En alta servo kaj himno klara,
Kiu povas kun dolĉeco tra mia orelo
Min ŝanĝigi en ekstazojn
Kaj vidigi la tutan ĉielon al miaj okuloj.

Tiel konstruiĝis, en mil komplikaj kaj malsimplaj formoj, la pastra mensogo. Ekzistas dudekoj da grandaj religioj en la mondo, ĉiu kun dudekoj aŭ centoj da sektoj, ĉiu kun siaj pastraj klasoj, sia komplika kredaro kaj rito, siaj ĉieloj kaj inferoj. Ĉiu havas siajn milojn aŭ milionojn aŭ centmilionojn da "veraj kredantoj"; ĉiu kondamnas ĉiujn aliajn, pli aŭ malpli sincere — kaj ĉiu estas potenca fortikaĵo de subaĉetado.

El angla lingvo kun aŭtora permeso tradukis Karl Fröding.

La Mirakloj de Dio Kabalaŝ

Elio Erenburg

La suba rakonto estas fragmento el unu el la 13 noveloj de E. Erenburg, konataj sub la titolo komuna "Dektri Pipoj". En formo literatura kaj iom amuza ĝi pentras la religiajn morojn de negroj. Tute amuza aspektas por la moderna homo tio, kio por sovaĝa homo estas mirakla, supernatura kaj dieca. Same amuza aspektas por la estonta homo tio, kio estas mirakla kaj supernatura por niaj samtempuloj.

Iom pri la personoj de la rakonto: Van Esterped estas belgia milionulo; por ioma ripozo li entreprenis kun siaj amikoj plezur-vojaĝon al Afriko. Sur rivero ilia jahto estis atakita de hipopotamoj, formangintaj ĉiujn vojaĝantojn, escepte Van Esterped, kiun iu "miraklo" savis de la morto. La saviginto en sia vagado trafas al negra vilaĝo, renkontas junan negran knabinon kaj neatendite travivas amo-aventuron, performante la knabinon. Pro tio li estas pucenda de la kaptintaj lin negroj. Kaj nun...

... Por kompreni de la sekvantaj okazantaĵoj necesas transiri de la travivaĵoj de la senmalespera milionulo al la moroj kaj vivkutimoj de la nigraj homoj, kiuj

laŭ la tute ĝusta konjekto de Van Esterped, apartenis al negroj, kaj pli precize, al la gento Hobulu. Kiom ajn stranga tio ekŝajnus, la negroj el la gento de Hobulu, loĝantaj je grandega distanco de Bruselo kaj de la aliaj kulturaj centroj, havantaj nek hotelon, nek modestan poŝtofiĉejon, — estis homoj ekstreme etikaj. Ĉiuj ili, eĉ la eta negrido, pereinta sub pantoflo kaj bastono de Van Esterped, bonege sciis, ke en la mondo ekzistas la bono kaj la malbono. Sed, ne posedante la verkojn de ekleziaj patroj, nek la jur-kodeksojn, ili ne sciis, kiamaniere distingi la malbonon de la bono kaj la bonon de la malbono. Kabalaŝ, kiel ĉiuj dioj, havis okulojn, orelojn, nazon, buŝon, sed li estis konceptanta la mondon per sia grandega malfermita umbiliko. Ke la dio Kabalaŝ estis konceptanta la aĵojn nekoncepteblajn — tio ne multe kontentigis la homojn el la gento de Hobulu. Ilin pli multe gojigis tio, ke per la sankta pipo la dio Kabalaŝ estis transdonanta al ili eron de sia saĝo kaj helpadis difini, kio en homo estas la malbono kaj kio estas la bono. Tio estis farata

jenamaniere. En la pipon, tranĉitan el la malmola kokos-arbo, pli ĝuste en tiun ĝian parton, kiu prezentas la malfermitan umbilikon de la dio Kabalaŝ, estis enmetataj kelkaj grenoj de kanabo. Poste la plej pia homo el la gento de Hobulu, la gvidanto kaj juĝisto, estis proksimiganta al siaj dikaj lipoj la longan buŝtubon de la pipo. Bruliginte per karbo la kanabajn grenojn, li ritme estis englutanta kaj elglutanta la aroman fumon. Oni venigadis al la gvidanto la homon esplorendan, kaj la gvidanto, fumante la pipon, longe rigardis en la umbilikon de la esplorado. Iom post iom la klarvido de la dio Kabalaŝ estis transdonata al la gvidanto. La malbono kaj la bono, kiuj enestas en homa animo kiel nevideblaj sableroj, estis kreskantaj ĝis amplekso de gigantegaj montoj. Se la homo faris malbonan aferon, la gvidanto, rigardante lian umbilikon, vidis komence baraktigantan vermon, poste serpenton, kaj fine, grandegan boan — tian homon la pias homoj el la gento de Hobulu mortigadis kaj lian viandon ĵetadis al ŝakaloj. Se la homo estis bona, la gvidanto vidis birdon, ŝafon kaj elefanton, al tia homo oni estis donanta ŝafajon kaj palmo-vinon. Tiamaniere la sankta pipo helpis al homoj el la gento de Hobulu gardi la justecon, puni la kulpulojn kaj rekompenci la indulojn. Anstataŭante plene la teologiajn traktatojn kaj kriminalajn kodeksojn, ĝi postulis neniujn mensajn penojn, transformantajn la plensukajn

junulojn de la jura kaj teologia fakultatoj en la antaŭtempajn maljunulojn, kaj samtempe ĝi evitigis la tiel oftajn, ve, juĝ-erarojn.

Necesas rimarkigi, ke el la vidpunkto eŭropa, tiel nomata "sciencia", estas facile klarigeblaj la moroj de la gento Hobulu, se ni rememoras ke el la semoj de hinda kanabo, kreskanta en Afriko, estas produktata narkotilo, nomata "haŝiŝo". Homo, fumanta la haŝiŝon, aŭ englutanta ĝin, konceptas ĉiujn videblajn aĵojn, sonojn, kolorojn, odorojn kaj eĉ abstraktajn konceptojn en multe pligrandigita aspekto.

... La homoj el la gento de Hobulu povus tuje formangi la kaptiton, sed al tio malhelpis la samaj etikaj inklinoj de tiuj ĉi nekonataj al la mondo piuloj. Ili firme kredis, ke ĉiu manĝaĵo, eniranta la homon, superigas aŭ malsuperigas lian animon. Manĝi koron de leono aŭ hepaton de kondoro signifas akiri kuraĝon. Manĝi orelojn de leporo aŭ voston de vulpo — signifas fariĝi malkuraĝulo. Tial la homoj el la gento de Hobulu neniam manĝis nekonatajn al ili homojn; kiel jam estis dirite, la viandon de ti-kiuj evidentiĝis malbonaj, ili ĵetadis al ŝakaloj, por ke tiuj abomenaj idoj fariĝu ankoraŭ pli abomenaj.

Ne formangi la blankan homon intencis la idealistaj indiĝenoj, sed juĝi lin, tio estas kun helpo de la dio Kabalaŝ ekscii, kion portas li al la gento de Hobulu — ĉu la bonon, ĉu la malbonon? Kanĝa, la gvidanto, prenis la pipon kaj, enmetinte en umbilikon de la dio kanabo-grenojn, ekfumis ĝin. Tuje sur lia vizaĝo montriĝis la rideto de kontentigo je dia saĝo. Aliaj homoj el la gento de Hobulu komencis forŝiri de sur Van Esterped la veŝton por nudigi lian umbilikon, ĉar ĝuste en tiun ĉi umbilikon devis rigardi la saĝega Kanĝa. La milionulo, ne komprenante kial la indiĝenoj tiele interesiĝas pri lia ventro, konkludis ke tio estas evidente la kuracistoj, kaj laŭ la malnova kutimo, dumkiam la negroj, batalante kontraŭ la tro komplikaj por ili butonoj ĉiel puŝadis lin, — li fermetinte la okulojn flustris:

— Ne, ne doloras... kaj ankaŭ tie ĉi ne doloras... Ĉio estas en la ordo...

Ekrigardinte la umbilikon de la blanka homo, Kanĝa nenion ekvidis. Tio estas, — li ekvidis ti-kion vidis ĉiuj: la harozan ventron kun cirklo, sed sub ĝi estis neniu signoj de la malbono aŭ de la bono. Maltrankviligita pro tiu ĉi stranga cirkonstanco, la saĝega Kanĝa demandis:

— Ĉu homo estas li?


Tuje la homoj el la gento de Hobulu komencis kontroli, ĉu Van Esterped estas homo; ili ŝiris lin je la haroj, enrigardis la buŝon, tiklis lian akselon kaj lekis lian nazon. La konjektema milionulo konkludis ke tio evidente estas la serĉ-esploro kaj modeste prezentis sian pasporton, la karton de balotanto, vaporsipan bileton, eĉ la personan invitilon al matenmanĝo ĉe belgia reĝo. Sed ĉiuj ĉi dokumentoj ne kontentigis la nigrajn homojn, kiuj daŭrigis kontroli la ekzisto-ĝustecon de Van Esterped per la manoj, piedoj kaj lango. Fine, ili respondis al la gvidanto:

— Jes, tio estas homo.

Kanĝa ekfumis duan pipon kaj denove li ekvidis nenion, krom la haroza ventro kun la cirklo. Lin ekposedis la timo, kaj li demandis:



Izido.



Centaŭro.

— Ĉu estas vere, ke mi, Kanĝa, vivas kaj fumas la sanktan pipon de la dio Kabalaŝ?

Tiufoje, kontrolante la evidenton nek per la manoj, nek per la piedoj, la nigraj homoj respondis:

— Jes, ci, la saĝega Kanĝa, vivas kaj fumas jam la duan pipon de la dio Kabalaŝ.

Tiam Kanĝa ekfumis la trian pipon kaj eniĝis per la okuloj en la umbilikon de Van Esterped, penante trovi sub ĝi almenaŭ malgrandetan vermon de la malbono aŭ la etan birdidon de la bono. Sed ĉiuj liaj penoj estis vanaj. En teruro li flankenmetis la sanktan pipon kaj ekkriis:

— La dio Kabalaŝ vidas ĉion. Sed ne ĉion vidas la kompatinda Kanĝa, eĉ kiam li fumas la pipon de l'dio. La blanka homo — ne estas simpla homo. Mi ne scias ĉu la bono estas en li aŭ la malbono. Sed se en li estas la bono — ĝi estas pli granda ol la tero, kaj miaj malfortaj okuloj vojperdis en ĝi. Kaj se en li estas la malbono — ĝi estas pli granda ol la akvo, kaj miaj malfortaj okuloj dronis en ĝi.



Niksino.

Tiele parolis Kanĝa, ĉar la saĝega homo scias, ke vespere ne la suno mortas, sed blindiĝas la okuloj, — li egale glorigas la dion Kabalaŝ tage, kiam li distingas la malproksimajn nubojn en la ĉielo, kaj nokte, kiam li ne povas distingi eĉ pulojn sur sia propra brusto.

La homoj el la gento de Hobulu pie aŭskultis la vortojn de Kanĝa kaj genufleksis por bone pripensi ilin. Pripensinte, ili diris al Kanĝa:

— Se Kanĝa ne povas ekvidi la blankan homon, do eble la blanka homo povos ekvidi Kanĝa'n.

Al Van Esterped oni donis la sanktan pipon. Komence li afable rifuzis, ĉar li fumis nur malfortajn egiptajn cigaredojn. Sed la nigraj homoj estis homoj obstinaj, kaj rememorante diversajn malagrablajn gestojn, per kiuj ili akompanas siajn vortojn, Van Esterped preferis preni inter la dentojn la pipotubon. Tuje li spertis dolĉon, nekonitan al li ĝis tiam, kaj milde ekridetis.

Liaj okuloj fermiĝis, poste denove malfermiĝis pli larĝe ol kutime kaj la milionulo komencis rigardi la umbilikojn de homoj kaj objektoj. Antaŭ ĉio li ekvidis palmojn, pli altajn ol ĉiuj domoj en Bruselo. Poste li ekrigardis la umbilikon de lago kaj forgesis pri ĉiuj akceptitaj dum sia vivo vanoj... Li ekrigardis birdon kaj en la memoro eksilentis ĉiuj ĝaz-bandoj, ĉiuj violonoj, ĉiuj harpoj, miloj da teatroj, kafejoj, hoteloj. Fininte tiun ĉi antaŭpreparan observon, Van Esterped, senlime konsternita, komencis rigardesplori la homojn el la gento de Hobulu.

Per la umbiliko de nigra virino li ekkonis la neordinaran amon, pri kiu li neniam aŭdis en Bruselo — li ekvidis, kiel ĉi virino per varmaj manoj ekkaptis venenan serpenton, intencintan mordi la nigran homon, kiun ŝi amis, la fremdan homon, la fremdan edzon; li ekvidis kiel du edzoj, ŝia propra kaj fremda, vipis ĉi virinon per fortikaj lianoj, sed la amo ne estis foriranta el ŝi.

Rigardante la umbilikon de maljunulo, li ekvidis grandan kuraĝon: ĉi kadukulo, savante nigran infanon, sursaltis furioziĝintan rinoceron kaj per malgranda ponardo traboris ĝian cerbon.

Rigardante la umbilikon de maljunulo, li ekvidis grandan kuraĝon: ĉi kadukulo, savante nigran infanon, sursaltis furioziĝintan rinoceron kaj per malgranda ponardo traboris ĝian cerbon.

Aliaj umbilikoj sur la ventroj junaj kaj maljunaj, viraj kaj virinaj malkovris al li ĉion, per kio vivas homo: pasion, mildon, malamon, noblon, perfidon, ĵaluzon, funebrom. La milionulo komprenis, ke li vere naskiĝis kaj ekvidis la mondon. Pro la ĝojo li komencis danci, salti, krii kaj ridegi. Ĉirkaŭ li, ebrigiĝitaj de saltoj kaj kriegado de la blanka homo, kantis kaj dancis la nigraj homoj el la gento de Hobulu. Van Esterped sentis — jes, elfuminte la sanktan pipon kaj conceptinte esencon de la mondo, li komencis eĉ senti, — ke li ne plu deziras la kvinhoran teon kun kukajo, nek virinan matenveston en dormoĉambro, ke li ne plu serĉos poŝtoficejon por mendii al si vaporŝipon, kuraciston kaj valizojn. En infaneca gajo li forjetis de si ĉiujn siajn komplikajn vestaĵojn: ĉapelon, palton, surtuton, veŝton, pantalonon, kolumon, koltukon, ambaŭ ĉemizojn, kalsonon, pantoflojn, ŝtrumpojn kaj multon alian, kaj demetinte ĉion, subtile rozkolora, kun ansersimila haŭto, sed kun la supera beno li rulis en la densa herbo, ronkis kaj kisis ĉiujn umbilikojn, instruitajn al li la ĝojojn de estado.

La nigraj homoj deziris, ke la blanka homo, ekfuminte la duan pipon, ekrigardu je Kanĝa, kaj Van Esterped ekvidis tutan aron da serpentoj, koketece elŝovantaj siajn langojn. Kanĝa estis saĝega kaj malbona. Mortiginte multajn senkulpulojn, li fariĝis gvidanto de Hobulu-gento. Van Esterped fermis la vizaĝon per la mano, profunde ekspirante. La nigraj homoj komprenis, ke la blanka homo ekvidis en Kanĝa la malbonon kaj, estante homoj piaj, ili mortigis Kanĝa'n, kaj lian korpon jetis al ŝakaloj.

La ŝakaloj manĝis la viandon de Kanĝa, sed la homoj el la gento de Hobulu nenion manĝis, kaj tial ili estis multe malsataj. Denove kaŭriĝinte, ili ekpensis kaj tiam al la plej saĝa, aŭ, eble, al la plej malsata venis la feliĉa ideo:

— La blanka homo estas sankta homo. Se ni manĝos lian viandon, lian koron kaj lian hepaton, ni ankaŭ fariĝos sanktaj homoj.

Estante feliĉa, ĉi ideo estis tutcerte aprobita de ĉiuj kaj la kompatindan Van Esterped la nigraj homoj el la gento de Hobulu formanĝis, ili formanĝis en la espero fariĝi sanktuloj, kaj ankaŭ ĉar ili sentis grandan malsaton...

Eirusigis 1516.

Idol-ofero

(El la antikva slava idolista kulto)

S. GORODECKIJ

*Estas preta silika hakilo,
Sur herbejo holektis sin ili,
Sin kolektis sub verdaj folioj.
Tie blankas la trunk' nudigita,
Tie blankas tilia la trunk'.
La tilio belligna, tilio —
Tilia la trunk'
Nudigita.*

*Antaŭ ĉiuj vilhara sorĉist',
Venas la maljunul' en ornam'.
Du mil lunojn travivis li jam.
La hakilon li tenis.
De lagaro alvenis
Sola li.
Li unua ekfrapu
Al la blanka tilii'.*

*Du knabinojn elektis la akra okulo
De la maljunulo.
En iliaj pupiloj —
Nur timaj briloj.
Kvazaŭ trunk' blankas korpoj iliaj.
Nur tiliaj
Tiel blankas la trunkoj bellignaj.*

*Jen li unu knabinon venigis,
Al la trunko alligis
Forte ŝin,
Svingis per la hakil' —
Trasonoris kriet'.
Falis kap',
Venis fin'.
Tia estis unua ekfrap'.*

*Kaj levadis aliaj post li
Tiun sangan hakilon,
La silikan hakilon
Al la korp' —
Kaj al trunk'
Refrapadis.*

*Kaj sangiĝis la trunk',
Fariĝinte vizaĝ'!*

*Jen la stri' — ĝi la naz',
Jen la tru' — ĝi l' okul',
Al la korp' —
Kaj al trunk'!
Purpurigis la junk'
Per la ruĝa makul'.
Kaj por vi
Ĉe pied' kuŝas jen
Nova di'.*

El rusa lingvo tradukis N. NEKRASOV.

Pri preĝado kaj di-kredo

Multatuli

Sur alta turo staris patrino kun sia infano. La infano falis de ŝi el la brakoj.

Samtempe falis alia objekto. Ĝi estis samampleksa, kiel la infano; ĝi havis la saman pezon, kiel la infano. La altirforto al la tero, la rezisto de la aero . . . ĉio efikis al tiu objekto samgrade, kiel al la falanta infano.

Sed la infano vivis kaj havis patrimon, kiu ekŝiris la harojn pro mal-espero.

Pri la alia objekto neniu okupis sin.

— Ho dio, ho dio, mia infano, mia kara infano, — plendkriis la patrino.

— Ho dio, gardu mian infanon!

Neniu preĝis por tiu alia objekto.

Kaj unu flanke de l' alia malsupreniĝadis ambaŭ falantaj korpoj, kun la sama rapideco.

Kaj la naturo — tio estis antaŭ Newton¹⁾ . . . tamen ĝi sciis precize kiel ĝi devis faligi — funkciis plue. Ĝi prikalkulis tre trankvile la kvadratojn . . . atentis pri la plia rezisto malsupre, kie la aero estas malpli maldensa . . . subtrahis tiun pluson de la rapideco . . .

Refoje kriis la patrino:

— Ho dio, mia infano!

La infano falis frakasita. La patrino, kiu estis preĝinta vane, mortis. La patro de la infano frenezigiĝis, ktp.

Sed la sako da korko, aŭ la ŝinko, aŭ kio ajn ĝi estis, kio falis kune kun la infano de tiu turo, — restis sako da korko, aŭ ŝinko kaj aspektis, kvazaŭ nenio estis okazinta.

Tamen oni ne estis preĝinta por tiu korko.

Ĉu tiel estas bone? Certe, certe! La plej eta konfuziĝo, la plej eta deflankiĝo kaŭzus akcidenton senfine pli grandan, ol la morto de l' infaneto.

Mi ne rakontas tiun historion por fari kritiketon pri la naturo, sed por atentigi pri tio, ke preĝi ne efikas, kaj ke oni devas firme teni sian infanon, kiam oni staras kun ĝi sur turo.

Ĉar ankaŭ pri tio zorgas la naturo; se oni faras tion, la infano ne falas. Ankaŭ en ĉi tio ĝi estas samtiel certa, kiel en la apliko de la leĝoj de Newton, t. e. ĝiaj leĝoj, kiujn Newton pristudis malgrandparte post kiam ili estis jam funkciintaj korekte dum senfina tempo.

*

Kiu kredas al dio, tiu devas konfesi miraklojn, t. e. deviojn (nenormalaĵojn, deflankiĝojn) en la leĝoj de la naturo.

El holanda lingvo tradukis G. P. de Bruin.

¹⁾ Newton (Njuton) — angla scienculo, malkovrinta la leĝon de la gravitado (altirforto).

Scienco renversas asertojn de pastroj

FRAGMENTO

I. Lederer.

Depost kiam homoj komencis pensi, de tiam naskis disputon la demando — kiu estis pli frue: homo aŭ dio? Tiu ĉi demando estos respondita diference, depende de tio ĉu la respondanto estas teisto, t. e. di-adoranto, aŭ ateisto, t. e. di-neanto aŭ, pli bone dirite, natur-ekkonanto. La teisto diferencas de la ateisto per tio, ke li kredas la mondon kreita de supernatura estaĵo; kontraŭe, la dua estas konvinkita, ke la naturo — la materio — estas eterneca. La teisto kredas, ke la homo estas rezulto de momenta dia kre-kaprico, kontraŭe la alia scias, ke la homo estiĝis post longaj evolucioj, ke la homo estas la lasta kaj plej bona produktaĵo de milionjaraj ŝanĝiĝoj kaj aliĝoj.

La di-neanto scias, ke la homo ekzistas pro la naturo, kontraŭe la alia kredas, ke la naturo ekzistas pro la homo.

Mi petas atenti — mi diras ke la teisto kredas kaj ke la ateisto scias, kion li diras.

La ateisto havigis al si sian scion per studado de la naturo, li konas la natur-evoluon — la kredanto vidas nenaturan vojon.

La teistoj konkludas laŭ la biblio: "dio estis unue, li kreis la mondon kaj la homojn" — per tio ili diras kaj pravas ĉion.

Nun venis la esplorantoj. Galileo pruvis al ni, ke tiu ĉi nemoviĝanta tero, ĉirkaŭ kiu sin devus turni la alia mondo, mem moviĝas kaj estas dependa de la suno. Li devis pro turmentoj publike rifuzi de siaj vortoj.

Ĝiordano Bruno, kiu asertis, ke la tero estas globa, estis pro tio bruligita de ekleziistoj.

La astronomoj eltrovis kaj klarigis, ke kelkaj steloj bezonas miljarojn por ĵeti sian lumon sur la teron, sian lumon — kiu trakuras dum sekundo 40000 mejlojn.

La fizikistoj pruvis al ni, ke nenia estaĵo fabrikis fulmon, tondron kaj pluvon, sed ke ili estas kaŭzataj de la kolektiĝanta elektro. Nuntempe eĉ homoj jam kaŭzis artajn fulmotondrojn per pafilig-pafoj. Oni ja ankaŭ povas trankviligi ondofrapantan maron per kelkcent bareloj da oleo.

La geologoj montras al ni ke la tero ne nur ekzistas depost 5684 jaroj, — ili pruvis, ke ĝi bezonis milionojn da jaroj por fariĝi tia, kia ĝi estas. Angla scienculo pruvas, ke 70000 jarojn antaŭ la "kreo" de la tero homoj troviĝis tie. Honestaj homoj legas la "dian vorton" el ŝtonoj kaj eltrovaĵoj, malhonestaj — el libraĉoj.

La scienco legas la kronikojn de la geologio, la teologio preferas la skribadon sur papero, ĉar tio estas pli taŭga por trompi la nepensantan popol-amason.

Fine venis Darwin kaj aliaj scienculoj, kiuj konvinkis nin, ke la multlaŭdata, nobla "di-plenportreto" devenas de besto. — Mi diras, ke

la homevoluo iris trans besto. — Nur mallongan pruvon. Se la homo ankaŭ ne scias tion, ne volas scii tion aŭ ne konsentas, li devas esti konvinkita de sia propra korpo; ĝi scias pli bone tion.

La embrio ne tuj homsimilas en la patrino korpo; sed ĝi travivas — kvazaŭ memore — la tutan evoluon de la besto ĝis la homo. Dum iu periodo la embrio similas al vermo, dum la alia — ĝi havas bronkojn kaj naĝilojn kiel fiŝo; je fino de l'kvara monato subite la tuta korpo kovriĝas per haroj. Unue tre delikataj haroj, komencantaj sur la kapo, brovoj kaj okulharoj, poste senhalte kreskantaj trans la vizaĝo, brusto, ventro, dorso, manoj kaj piedoj, ĝis la estonta homideto havas ĝustan pelton. Precipe dense kreskas haroj sur la vizaĝo kaj je la malsupra parto de la dorso super la krucosto, tie, kie ĉe niaj parencoj — la suĉbestoj — troviĝas la vosto. Ĉirkaŭ la sepa monato la pelto atingas la plejan denson, poste ĝi iom post iom malaperas kaj dum naskiĝo de maturiĝinta infano ĝi estas for. — Ĉi embrio pravas faktojn, kiuj ekestiĝis milionojn da jaroj antaŭ la komenco de la homaro; ĝi pravas, ke la homo iam estis besto kun vosto aŭ besto, kiu vivis en akvo kaj spiris per bronkoj, aŭ kiu havis maldikan kartilagbastonon anstataŭ malmola fortika vertebraro en la dorso.

Ja ekzistas homoj, kiuj tre multon scias, kiuj ĉion legis kaj vidis, sed la plej proksiman ili ne komprenas — ilian propran korpon. Do, ke ni devenas de besto, ni ne volas plu citi — sufiĉas — se ankaŭ tio estas malagrabra por niaj piuloj...

El germana lingvo tradukis X.

Evoluo de koncepto pri dio

La ideologio de homo, t. e. lia koncepto pri mondo, scienco, religio moro, moralo, juro ktp., dependas de la ekonomiaj rilatoj inter la homoj, kaj tiuj lastaj dependas de la mastrumo-formoj, kiujn siavice kaŭzas stato de la tekniko.

Pliperfektigintaj produktiloj estas sekvataj de novaj mastrumo-formoj, de novaj ekonomiaj rilatoj kaj de nova ideologio.

Kaj en la evoluo de la koncepto pri dioj ni plene observas tiun leĝecon.

Ni povas konstati ke en la prasocio kaj en la patriarka socio, kiam la tekniko estis tre primitiva kaj kruda, la dioj estis same primitivaj kaj krudaj: ili estis bestoj, duonbestoj-duonhomoj, krudefaritaj homsimilaj idoloj. Kaj same kiel ĉiuj homoj de tiu socio laboras mem, ne estante forŝiritaj de la produktado, — samtiel ĉiuj dioj vivas sur la tero, ili estas surteraj dioj.

Ĉe la malforta terkultura mastrumo, kiam la reganta sklavposedula klaso estis duone forŝirita de la mastrumado, la dioj estas ankaŭ parte forŝiritaj de la tero. Tiel la grekaj kaj romaj dioj loĝas jen sur la tero, jen pli proksime al la ĉielo (sur pinto de la monto Olimpo); ili estas jam surtere-ĉielaj dioj.

En la feŭda epoko, kiam la terkulturado estas jam bone organizita, la reganta klaso estas tute forŝirita de la produktado; kaj konforme al tio la dioj ankaŭ plene forŝiriĝas de la tero kaj fariĝas ĉiel-loĝantaj.

La tekniko evoluis senĉese; aperas teleskopo kaj per ĝia helpo homo povis certigi, ke nek en nuboj nek sur la planedoj, nek en la ĉielo estas ob-

serveblaj la dioj. Tiam homo faras sian dion spirito, kiu troviĝas en la tuta universo.

La tekniko progresas plie kaj la progreso ĝia mem fariĝas ĉiam pli rapida. Kaj jen la modernaj filozofoj-idealitoj (Ostwald, Mach, Avenarius), konsentante pri tio ke nenio dio ekzistas, tamen provas serĉi en la movado, kiun posedas partetoj de la materio, diversajn ecojn de *abstrakta dio*: unuecon, nekoncepteblon, ĉiopotencon, ĉieekziston kaj similaĵojn; ili eĉ grandlitere skribas: Movado aŭ Movanta Forto.

Klare montras tiuj ekzemploj, kiel paralele kun la disvolviĝo de la homaro la dioj estis pli kaj pli malproksimiĝantaj de la tero, kiel ili fariĝis samtempe pli diafanaj, senvizaĝaj kaj nekompreneblaj. Kaj ni povas konstati ke tute same evoluis la gvidantaj formoj de kapitalisma ekonomio kaj la surteraj regantoj: la poseduloj, la "sinjoroj" estis ĉiam pli kaj pli forŝiriĝantaj de la produktado kaj paralele al tio ili estis perdantaj sian difinitan aspekton, vizaĝon; komence tute konkreta, kapitalisto transformiĝas en trustojn kaj kartelojn ĝis la gvidado de la kapitalisma mastrumo transiras al la financa kapitalo.

Homo faras dion sia plenportreto, li igas la dion vivi samtiel, kiel vivas lia kreinto-homo. Jen dioj de ĉasistoj mem estas ĉasistoj; dio de amerikaj indianoj Viŝni-Manitu vizitas homojn por fumi kune kun ili la pipon de paco.

Dioj de paŝtistoj estas ankaŭ paŝtistoj. Postrestojn de tio ni trovas eĉ, en evangelio: tie Kristo estas nomata "paŝtisto bona", kaj la homoj — "ŝafoj".

Grekaj kaj romaj dioj vivas tute same, kiel vivas romaj patricoj: ili militas, diboĉas kaj ne laboras.

En la feŭda epoko la reganta klaso prezentis grandan ŝtuparon, supre de kiu estis la reĝo, pli malsupre estis dukoj, baronoj ktp. Konforme al tio la kristanismo tiutempa pentris la saman ŝtuparon de dioj: supre estis la dio-patro, pli malsupre apostoloj kaj diversrangaj sanktuloj. Sur la tero estis reĝo kaj princo-heredanto, samtiel en la ĉielo estis dio-patro kaj dio-filo. Favoron de reĝo oni povis atingi per reĝino, por trovi favoron de dio enĉiela necesas sin turni al li per di-patrino.

La feŭdan epokon anstataŭis absolutaj monarkioj kun la tutpotenca nelimigita reĝo en la kapo. Protestantismo (Luter, Kalvin) kreas absolutan monarkion en la ĉielo, neniigante sanktulojn kaj ceterajn diidojn.

Aperas fine la kapitalo, kiu jam ne povas kontentigi sin per la limoj de monarkio; ĝi penas penetri ĉien, en ĉiun viveron, subigi al sia influo la tutan terglobon. Kaj en la kapitalisma epoko disvolviĝas kaj plifortiĝas en la socio la ideo pri ĉiestanta dio-spirito.

"Dio kreis la homon sia plenporteto" — diras al ni la pastroj; ni, analizante la historian evoluon de la koncepto pri dio, konstatas: — homo kreis sian dion plena portreto de la homo mem.

El A. Figurin "ABC de sendieco" trad. G. P.

Mia kredo

N. MINSKIJ

*Estis mi infano pia;
Estis mia kred' sincera,
Ke Jezu' — paŝtist' ĉiela,
Kaj ke ni — ŝafaro tera.*

*Ve! Pri la paŝtist' ĉiela
Mi pekeme jam forgesis,
Sed, ke la homar' — ŝafaro,
Kredi mi neniam ĉesis!*

Elrusigis N. Vladimiroviĉ

Nokta renkonto

Neniu.

Estas malvarma aŭtuna nokto. La antaŭkuranto de l'vintro jam komencis sian detrulaboron. Gravedaj nuboj pelas sin super la domoj. Densa mallumo, kvazaŭ ia maso, kuŝiĝis sur la urbon, limiĝinte la vidon ĝis la nazo.

Tempio furiozas.

Sin atingante zigzagas la fulmoj, akompanate de brua tondrado. Iliaj bluetaj ekbriloj por momento akre lumigas la malpurajn domojn, dormantajn fenestrojn, oscedantajn pordokavojn. Pluvegas, kvazaŭ iu verŝus ĝin. En la kurba strato ie-tie heletaj flamoj de kelkaj gaslanternoj batalas kontraŭ la ventego; iliaj flagrantaj briletoj malforte respeguliĝas en la akvaĵoj, kaj la vibrantaj flamoj gigante kaj fantazie longigas la ombrojn de kurbaj arboj, bord-irantaj la vojon, kaj kliniĝinte ili dancas sur la malseka grundo. La reiĝinta vento obstine tiras mian eluzitan mantelon, penante forŝiri ĝin. Verŝajne la somero kaj la aŭtuno fiksis tie ĉi rendezvuon por sterni unu la alian.

Envolvite ĝis oreloj, firme fiksite la ĉapelon, sole mi vagas hejmen. Glitante en la glueca koto, per grandaj saltoj zorge mi klopodas eviti la akvaĵojn, kiuj etendiĝas sur la trotuaro. Grumble mi ekinsultas, se pro la ega singardo mi saltas ĝuste en la mezon de iu akvaĉo kaj mia piedo eniĝas la maldensan koton. Frosta malpura akvo penetras en miajn ŝuojn. Mi rapidigas la paŝojn por trafi sub tegmenton antaŭ ol mi estos tute malseka. La vento returnis sin kaj la aŭtuna pluvo senindulge frapadas al mia vizaĝo. Klimiĝinte mi luktas, por ke mi povu iel progresi antaŭen... Kia freneza vetero!.. Oni vidas eĉ nek unu hundon; ankaŭ ili kaŝis sin en iun ŝirmejon... Subite mi aliras iun...

— Ho, ho, pardonon, sed oni nenion povas vidi pro la mallumo, — mi balbutis.

— Pardonebla dum ĉi vetero, — li respondis trankvile. — Ĉu vi permesas vin akompani?

— Min??...

Surprizite mi haltis. Alta seka viro staris apud mi, kun inteligenta vizaĝo, kaj el sub la alta frunto brilis okulparo, min demandante. Kiu povas esti ĉi nekonatulo, kiu havas humoron akompani iun hejmen dum tiu vetero? Kaj pro kio?

— Ĉu ne, vi estas surprizita? — daŭrigis li: sed ne miru la eksterordinaran konatiĝon, ne indas. Kelkokaze oni ne konsideras formalajon aŭ cirkonstancon.

— Do kiu vi estas kaj kion vi volas de mi? — mi demandis scivole, ĉar la stranga fremdulo ekinteresis min per sia maniero.

— Voli, mi volas nenion alian, ol iom babiladi kun vi. Kiu mi estas? La respondo estas simpla. Mi estas Satano... Ne SAT-ano, sed efektiva Satano, de profesie diablo, — aldiris li iom satire ridetante.

Nun mi ridetis satire:

— Do vi venas el la infero? — mi demandis moktone. — Eĉ mi ne scias, ke ankaŭ diabloj ekzistas.

— Mi venas el la sama infero, en kiu vi mem ankaŭ vivas, ĉar ni de eksto de ĉi mondo vivas kun la homoj. Ke vi ne scias pri diabloj, do ĝi signifas ke vi ne konas ilin. Ĉiu nekonataĵo malekzistas por la nekonanto.

— Interese... Sed tial vi verŝajne supozas, ke ankaŭ dio ekzistas, ĉar kiel mi opiniis, diablo ne povas ekzisti sen dio, kaj renverse, ja unu devenas de la alia.

— Via logiko estas ja klara. Nur simple vi konas nek tiun, nek alian.

— Simple?... interese... — mi murmuris duafoje. — La afero vere estas stranga. Verŝajne vi deziras fari al mi maltrafan sercon.

— Tio estas tute ekster mia intenco. Sed la homoj ĝenerale ne estas pensemaj. Ofte ili atendas alies helpon por solvi aŭ kompreni ion. Do mi decidis helpi vin. Mi konigos al vi la dion kaj Luciferon laŭ la biblio...

— Sed estimata...

— Nu, nu, mi ja tiuintence renkontis vin. Kiom da homoj lernis kaj legis ne komprenante ĝin...

— Sed mi estas ateisto! Nenion komunan mi havas ĉu kun dio, ĉu kun diablo, ĉu kun biblio, — mi respondis indigne.

— Nu, ne tiel arde. La biblio ekzistas. La skribaĵo restas skribita kaj ĝi regas la homan cerbon...



Surmonta prediko al politikaj arestitoj:
Feliĉaj vi estas, kiam oni turmentas kaj pelos vin... Goju kaj gaju, ĉar granda estos via rekompenco en la ĉielo!...
(Desegn. de D. Moor)

— Sed la tuta biblia afero ne koncernas min. Ja tio neniam okazis kaj ĝi estas nur fantazio. Neniam ĝi ekzistis!

— Vi vere eraras. Ĉu okazis la bibliaj historioj, ĉu ne, tion mi ne volas pruvi; do ne gravas, sed la historio de la biblio okazis, ĝi estas esenca parto de l'homara historio, tial ĝi ekzistas. Pro la historio ankaŭ la biblio ekzistas, ĉar oni skribis ĝin. Do, pro tio ankaŭ ekzistas la bibliaj historioj kun siaj dioj kaj diabloj, ĉar oni kredas ilin. Ĝis kiam ĝi havas lokon en la homa konscio, vane ni neas ĝin, ĝi restos vivanta fakto, influanta agojn kaj pensojn, do la okazantaĵojn, el kiuj esence konsistas la homa vivo. Akceptita aŭ heredita hipotezo fariĝas fakto per la kredo; nekonata fakto ne ekzistas pro la malkredo. Sagace estas menciita en la katekismo: "Kion signifas kredi? Kredi signifas — akcepti kion oni diras". Tre ĝuste. La kredo faktigas.

— Diabla logiko. Ĉu vi volas min re-religiigi?

— Mi ne intencas. Mi nur citos el bibliaj historioj por ke vi ekkonu la karakteron de dio kaj Lucifero. De kiam homo konas la biblion, la dio vivas sur la tero. Eĉ tion oni ne scias kaj tute ne konas lin. Oni akceptas la mensogadon de biblio-klarigistoj, kiuj prikantas la bonecon, amon, perfektecon de dio kaj la kontraŭajn ecojn de Lucifero, kvankam la historioj

priskribas la agojn de ambaŭ. Do ni bezonas nur analizi. Kiel vi povas ekkoni iun homon? Analizu liajn agojn. Kiel vi povas ekkoni dion kaj Luciferon? Ankaŭ analizu iliajn agojn, kiuj estas skribitaj en la bibliaj historioj. Ĉu vi faris tion?

— Ne... — mi respondis sincere.

— Nu ni komencu de la unua ĉapitro, de la unua homparo, kiu plej interesas la homon. Kiel vi scias, ili vivis en la paradizo. La dio malpermesis al Adamo kaj Evo manĝi la fruktojn de la scio-arbo, konservante por si mem tiun privilegion. Li bone sciis, ke estas eble regi nur super la malsciantaj homoj, samkiel nur malsaĝaj anĝeloj servas lin kaj la potencojn, reĝojn, kiuj ĉirkaŭas lian tronon. Lucifero ekkonis, ke dio despote kaj maljuste regas en la paradizo, farante privilegiitajn kastojn. Li organizis ribelon por forigi la maljustaĵojn, sed li malsukcesis, ĉar estis ankoraŭ multege da servemaj, humilaj anĝeloj. Do Lucifero serĉis aliancon kun la unua homparo kaj klarigis al ĝi la sekretojn de l' dia potenco, kiu sin kaŝas en la malscio de la anĝeloj kaj sekve de homoj. Se ĉiuj manĝus la fruktojn de la scio-arbo, la dia potenco diafaniĝus kiel nebulo, ĉar ni estus sampotencaj, eĉ pli... justaj. Adamo kaj Evo manĝis la fruktojn kaj vidis multajn malhumanajojn, pro kiuj eĉ ili, la senkulpuloj, ekhontis. Per sia fama ĉiopovo la dio povis nek malhelpi, nek forpreni la sciokapablon de la homoj, ili fariĝis prudentaj kaj kreopovaj. Eksciinte la agon, kion do faris la dio pro sia senfina pardonema boneco? Senindulge forpelis li ilin el la paradizo, por ke ili pereu, kaj per sia tuta amo li sufiĉe malbenis ilin. Lucifero ne forlasis la forpelitan homparon, sed kun sia eta ribelanta sekvantaro helpis krei al la homo alian mondon, pli belan kaj pli perfektan ol la paradizo, kie ekzistis regantaj kastoj kaj subpremataj servutuloj. En la homa mondo la plej sankta kredo estis la libereco. Vidu la homan kreopovon! Jen — kulturo, scienco, tekniko, ĉio-ĉio devenas el la scio, kiun la homo alproprigis per la helpo de Lucifero. Jen, jam komenciĝis la volo de Lucifero! La homo paŝo post paŝo dispelas la misteran nebulon, en kiun sin volvis la malkapabla dio. La astronomio detruas la postvivan mondon, la leĝoj de la natur-evoluo solvis la sekretojn de viv-aperoj; la spaco, tempo, distanco jam estas venkitaj! Jen la homo fariĝis sampotenca kiel dio. Sed ni ne preterkuru la historion.

Kiam la dio vidis, ke la homoj povas vivi ankaŭ sen li, ke ili ne bezonas lian paradizon, per ruzaj rimedoj li enŝteliĝis en ĉi mondon; liaj potencoj, reĝoj kun amaso da servemaj anĝeloj invadis ĉi tien, kaj Budhoj, Mahometoj, Jezuo helpis lin en ĉi konspiro. Per ŝtalo, sango, inkvizicio li trudis sin al la forpelita homo. Martir-mortoj de herezuloj signalas la muskol-streĉon lian por rekonkiri sian potencion. Reĝoj kaj potencoj je lia "sankta nomo" militis por subjugi, sklavigi la homon; ĉiujn siajn rajtojn ili derivadis de li, ili regas "per dia favoro". De tiu tempo la batalo inter Lucifero kaj dio revigliĝis. Ankaŭ nun estas grandamase inter vi liaj senkonsciaj anĝeloj. Ili aspektas same kiel homoj. La modernaj, ili estas sen flugiloj, sed certe ne sen armiloj. Oni nomas ilin juĝistoj, policistoj, soldatoj — ili estas la gardanĝeloj. Liaj servanĝeloj kuradas inter vi, en la ornamitaj konstruaĵoj ili predikas al vi pri bonintenco de dio, klopodante subpremi la homan scion kaj timigi la konscion per terura dia puno por la malobeemuloj. Ili estas nomataj pastroj, monaĥoj, kaj iliajn bandojn gvidas la keruboj, bone konataj, kiel papoj kaj episkopoj. Ili ĉiurimede persekutas la ribeleman sekvantaron de Lucifero: sed vane — la malkontenta amaso konstante grandiĝas. La batalo fariĝas ĉiam pli akra kaj klara...

Ĉu vi nun konas la dion? Li estas la animo de l' despotismo.

Ĉu vi ekkonis Luciferon? Li estas la ribelanta spirito de la revolucio. Kiuj sekvas Luciferon — estas diabloj; kiuj obeas al potencoj kaj reĝoj — estas anĝeloj.

Do dio vivas, ĝis regas liaj potencoj kaj reĝoj. Sed Lucifero kolektas siajn taĉmentojn kaj la eta grupo de l' iame ribelintaj anĝeloj organizas la gigantan revolucion de la XX-jarcentaj senrajtaj diabloj kaj per ties titana forto detruos la dian potencion por ĉiam!...

Ni alvenis hejmen. Frostremante ni haltis. Senĉese pluvegis kaj la vento fajfis en la kurbaj stratoj. En la kadukaj fenestroj krakadis la vitroplatoj. Senvorte mi prezentis mian manon. Li premis ĝin amike kaj aldiris:

— Memoru pri la historio de la Babilona turo. La dio enviis, ke la homoj komprenis unu la alian, li detruis la universalecon de ilia lingvo. Sed ni, Satanoj, rekonstruos la babilonan turon de la universala lingvo... Mi juras, li ne povos denove ĝin detrui, ĉar ĝis tiam la ribelanta armeo de Lucifero forbalaos lin kun liaj potencoj kaj reĝoj... Nu, ĝis revido!

Per rapidaj paŝoj li malaperis en la noktan mallumon. Palpante mi rampis supren sur la ŝtuparo kaj meditis pri la rakonto. Jes, kvankam mi estas ateisto, tamen mi devas konsideri, ke ankoraŭ ekzistas dioj, ties potencoj kaj reĝoj kun servantaj al ili anĝeloj — kaj Luciferoj, satanoj kun siaj ribelantaj diabloj...

En mia ĉambro mi bruligis la petrol-lampon. La murhorloĝo ĝuste batis akurate la dekduan de noktomezo.

Diotimaj bonfarulinoj

Fragmento el "La Ruĝa Ĉambro"

August Strindberg

... Tra la fenestroj aŭdiĝis bruo de alveturanta veturilo kaj de du virinaj voĉoj:

— La domo aspektas bone, — diris unu.

— La domo aspektas bone? — interrompis la dua: — ĝi aspektas terure!

— Mi opinias, ke por la celo ĝi bone taŭgas. Eble vi scias, veturigisto, ĉu en ĉi domo loĝas malriĉuloj?

— Mi ne scias, sed mi opinias ke jes; ja estas ekkoneble laŭ la eksterajo de l' domo, oni povas ĵuri...

— Ĵuri estas peko! Atendu ĉi tie ĝis ni revenos, farinte nian devon.

— Aŭdu, Eŭgenio, ni antaŭe interparolu kun la infanoj, — diris sinjorino Falk kaj haltis.

— Jes, tion ni povas fari. Alproksimiĝu mia amata infano! Kiel vi nomiĝas?

— Albert, — respondis la sesjara malgrandulo.

— Ĉu vi konas Jezuan, mia knabo?

— Ne! — respondis la malgrandulo ridante kaj metis la fingron en la buŝon.

— Tio estas terura! — diris sinjorino Falk, prenante la not-libreton: — mi skribos: "Katarino-Komunumo — Blanka Montaro; profunda spirita obskureco inter la infanoj" — ĉu ni povas sin esprimi per "obskureco"?

— Ĉu vi ne volas koni Jezuan? — ŝi refoje demandis la knabon.

— Ne!

— Ĉu vi volas moneron, mia infano?

— Jes.

— Ha, kiel terure malbonodoras ĉi tie, ni jam foriru, Eŭgenio, — petis sinjorino Homan.

Ili surpaŝis la ŝtuparon kaj eniris en grandan ĉambron, ne frapinte la pordon.

La lignajisto rabotis kun tia forta bruo, ke la sinjorinoj devis laŭte krii, por ke oni ilin ekaŭdu.

— Ĉu iu soifas ĉi tie dian vorton kaj lian favoron? — diris sinjorino Homan.

— Vi volas tie ĉi prediki dian vorton? — demandis la lignajisto, ĉesante labori: — de kie vi ĝin prenos? Ĉu ĝi ie ekzistas? Kio?

— Vi estas kruda homo kaj severa puno minacas al vi, — respondis sinjorino Homan.

Sinjorino Falk skribis en la not-libreto kaj diris:

— Tiu taŭgas por ni.

— Parolu vi, — diris sinjorino Homan.

— Tion konas mi! Eble vi volas paroli kun mi pri religio, miaj sinjorinoj? Mi povas paroli pri ĉio. Ĉu vi scias, ke antaŭ centoj da jaroj la sankta spirito estis opiniata de pastroj kaj malsaĝuloj kiel la plej bona artiklo?

— Ne, tion ni ne scias, mia bona homo!

— Kial vi nomas min bona? Neniu estas bona, krom dio sole — tiele diras la Biblio; nu, vi ne scias, kio estis iam, miaj sinjorinoj, kaj kiamaniere vi povas instrui aliajn, ne sciante mem? Nu, kiam vi volas ion bonfari, faru ĝin kiam mi turnos min dorso al vi, ĉar la vera bonfaro okazas kaŝite; faru ĝin al la infanoj, ĉar ili ne povas defendi sin, sed min lasu en trankvilo. Donu al ni prefere laboron, kaj se vi volas, lernu bone pagi la laboron, kaj vi ne devos veni ĉi tien por bonfari; ĉu vere, ŝuisto?

Ĉu mi povas noti: "Grandega senkredemo, tute hardita", Evelino? — demandis sinjorino Falk.

— "Obskura" — estas pli trafa esprimo, amata Eŭgenio.

— Kion vi skribas, miaj sinjorinoj? Miajn pekojn? Por ili ĉi libreto certe tro malgrandas.

— "La frukto de iliaj tiel nomataj laboristaj unuiĝoj".

— Tre bone, — konsentis sinjorino Homan.

— Gardu vin antaŭ la laboristaj unuiĝoj, — diris la lignajisto: — Centoj da jaroj ni batalis kontraŭ registaroj kaj iliaj reĝoj; nun ni komprenis ke ne ili kulpas; kontraŭ la nenionfaruloj ni elpaŝos, kontraŭ ti-kiuj de fremda laboro kaj peno vivas, kaj tiam ni ion ĝisvivos.

— Silentu, silentu, — diris la ŝuisto.

— Ĉu loĝas en ĉi domo ankoraŭ iu, kin soifas dian vorton?

— Ne, — respondis la lignajisto: — dian vorton ili ne bezonas, sed manĝaĵon kaj vestaĵon ili certe bezonas, kaj, ankoraŭ pli necese, laboron, bone pagatan laboron ili bezonas! Prefere ne eniru, miaj sinjorinoj, ĉar iu malsanas je variolo . . .

— Variolo?! . . . — ekkriis sinjorino Homan: — kaj oni ne diris al ni eĉ unu vorton! Venu Eŭgenio, ni sendos tien ĉi la policistaron. Fi, kiaj homoj loĝas tie ĉi!

— Sed la infanoj! Kies estas la infanoj? Respondu! — minacis sinjorino Falk per la kraĵono.

— Miaj ili estas, — respondis la patrino.

— Sed la edzo, kie estas via edzo?

— Tiu ne plu montriĝas, — diris la lignajisto.

— La policistaron ni sendos por serĉi lin. Tie ĉi devas ĉio ŝanĝiĝi! Tio estas vere bona domo por ni, kiel mi diris al vi, Evelino!

— Eble vi bonvolos ŝidiĝi? — demandis la lignajisto. — Estas pli agrable paroli sidante; seĝojn ni ne havas, sed ne domaĝas; ni ankaŭ ne havas litojn: la imposto por la gas-lumigo forprenis al ni la litojn, por ke vi en mallumo ne hejmeniru nokte el teatro. Ni ne havas gas-lumon, sed ankaŭ tio ne gravas, la malriĉularo povas kuŝi en mallumo. Ni devas ja ankaŭ eĉ malsani hejme, ĉar viaj aĉaj filoj bezonas la hospitalojn . . .

— Venu, Eŭgenio! Je dio, venu! Ne plu elteneble!

— Mi certigas vin, miaj sinjorinoj, ke ĉi tie efektive estas ne plu elteneble, — daŭrigis la lignajisto —: sed venos tago, kiam estos ankoraŭ pli malbone; tiam ni venos de la "Blanka Montaro" al vi, subpremantoj; kun granda bruo, kiel akvofalo, ni venos kaj repostulos niajn litojn! Ĉu postulos ni? Ne, ni prenos! Kaj vi devos dormi sur la tero, kiel ni, kaj vi devos manĝi terpomojn ĝis viaj ventroj ŝvelos kiel barelego.

La sinjorinoj malaperis, postlasante pakaĵon da broŝuroj.

— Fi, je la diablo! Kia malbonodora parfumo! Kvazaŭ post prostituistinoj, — rimarkigis la lignajisto: — ĉio ĉi valoras nenion, ŝuisto!

Per la blua antaŭtuko li forviŝis ŝviton de la frunto kaj ree komencis laboradi. La aliaj enpenŝiĝis. . . .
Esperantigis I. Jurysta.

"Kristo reviviĝis"

Damiano Bedny

Ipa! — pastraĉo monon havis.

Per preĝoj monon li alrabis

(ĉu en ĉi tio estas kulpo?)

Sed kiam homoj, kiel vulpoj,

Forgesis dion

Kaj jam komencis kofrojn ĉe riĉuloj trarigardi,

Sopiro kaptis pastron nian:

"He, kiel gardi

Riĉaĵon mian de "diabloj"?"

Pastr' estis ja ne sen kapabloj

Kaj dum la nokto mallumega

Ipa! saĝega

Transportis kofron enhavantan la monaron

En . . . la altaron!

Kaj per la kret' surskribis kun lertec' skribista:

"La kofr' kun korpo Krista".

Sed ruza diakono

Eksciis pri la mono

Kaj, elĉerpinte la riĉaĵon,


Li daŭrigis la skribaĵon:

"La kofr' je dia korp' seniĝis:

Krist' reviviĝis!"

El rusa lingvo tradukis

S. Alekseev (Serdobsk, Rusio)



Kio estas infero?

Pastro demandas laboriston, kiun li renkontis sur la strato:

— Kio estas infero?

— Infero, tio estas la laborista hejmo, kiam ĝin ekvizitas tia malsano ke li senlaboras kaj la infanoj petas manĝaĵojn, — respondas la laborulo.

— Ho, vi estas do vera bolŝeviko! — diras la pastro. — Sed kiu al vi tiele priskribis la inferon?

— Neniu estis priskribanta, patreto. Ĉe mi en la hejmo ĝuste estas ĝi. ("Robitnicja" — Laboristino, ĵurnalo en Kanado.)

El ukraina lingvo tradukis A. Levandovskij.

Ruĝa geedziĝo

L. Ivn

1. Li ĉion instruis

Tiam Rajt loĝis en nord-orienta arbario. Pinoj, abioj, pinoj, abioj kaj ducent homoj — nenio pli.

Sed li sciis precize: "el oriento — lumo" kaj li ne timis mallumon arbaran, ĉar li najbaris kun lumo. Rajt mem estis lumo: nazumon li portis franc-oran, eksterordinaran. Sed ne sola li estis lumportulo, ankaŭ la popo¹⁾ estis miopulo, sed siajn okulojn tiu ŝirmis per simplaj nikelaj okulvitroj, tute ordinaraj, eĉ iom malhelaj.

Tamen la popo kaj Rajt konkuris.

Rajt instruis delonge kaj instruis ĉion, eĉ akuŝon, sed precipe (ja li estis pop-konkuranto!) — kontraŭreligion.

Kiam la popo estis ŝlosanta sian butikon vespere, Rajt malfermadis klubon surstratan apud sia kabano. La klubo funkciis ĝis la popo ree talp-iris sian oficejon.

Kiu kunvenis ĉe Rajt? Junuloj kaj juninoj flavruĝaj, neniam maljunuloj.

Kion oni faris ĉe Rajt? Maĉis sunflorajn semojn, pinĉis unu la alian, kantis gaje, kelkiam (tre malofte) malgaje kaj balancis langojn. La gejunuloj baldaŭ fariĝis spertaj kontraŭpopoj kaj ili aranĝis tiajn mesojn, ke maljunuloj de ambaŭ seksoj kraĉis kaj indigne profetis:

— Atendu: oni vin bone frotos en geheno!

Sed Rajt-bando nur ridis je ĉi paroloj: la regno ĉiela jam estis konkerita de ili.

2. Kartludo kaj dio (Teologia analizo de dia ĉiopovo)

— Ĉu dio estas senpeka?

— Jes.

— Ĉu ĉiopova?

— Jes.

— Ĉu li povas fari pekojn?

— Ne.

— Sekve li ne estas ĉiopova, ĉar lia povo ne rajtas tuŝi pekojn.

— Nu, kial do? Li povas, sed...

— Sekve li ne estas senpeka?

— Nu bone: estu li senpeka kaj ĉiopova, nur vi imagu: mi, Alekso, kune kun via dio ludas "dudekunuon"²⁾.

1) — rusa patro. 2) — populara kartludo.

— Hontu! — indignas la maljunulo.

— Kial do honti: ja Jezuo Kristo urinis kaj eble disenteriis, kiam li en Palesteno vagis. Tre ordinara afero. Vi nur imagu: li tenas bankon kaj havas "valeton" kaj 2 okojn, sekve 18 poentojn. Mi — ason kaj naŭon, sekve 20. Ĉu povas via ĉiopovulo venki?

La maljunulo perfringe purigas la nazon kaj solvas la problemon:

— Kial do ne? Ekzemple: li ŝanĝos okon je aso kaj gajnos.

— Sekve via dio estas kartotrompisto kaj ne senpeka.

— Cin porkoj formanĝu! — konkludas la maljunulo, rampante for.

3. Dio punis!

Malgaja venis unuvespere al Rajt — Alekso la Multpeka.

— Helpu, kamarado! Malagrablaĵo.

— Ĉu dio vin punis per "malbona malsano"?

— Ne, dume ne... Li ĝin lasu por si mem. Mi ne bezonas. Tamen...

— Ĉu vi enamiĝis?

Alekso jesis kaj elverŝis sian historion. Estis li kaj ŝi, kaj fojnamaso, kiu tiel odoris ekscite...

4. Mario ne rifuzas, kontraŭe...

5. Alsendu la svatistojn!

— La panjo ne protestos. Ci nur agu laŭkutime.

Kaj Alekso priparolis kun siaj gepatroj, sendis la svatistojn al patrino de Mario, al maljuna vidvino, faris ĉion, kiel konvenas.

Gastame ŝi akceptis ilin. Estis brando kaj vianda barĉo. Kuko estis kun brasikoj, karoto kaj fungoj. Poste ŝi venis la fianĉejmon. Ree oni drinkis brandon, barĉon englutis. Ŝi kontrolis la fianĉ-havaĵojn kaj trovis ĝin bonstata.

Ree ŝin vizitis la svatistoj kaj plenplenigis siajn senfundajn stomakojn per trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Ili sin ŝarĝis tiel, ke nur la langoj apenaŭ povis insultaĉi.

6. La maljuna vidvino, Alekso kaj... po... po...

— Mi pretigis jam ĉion, ne hezitu. — klukis la maljunino al la fianĉo: jen ĉemizoj, pantalonoj, luitukoj, kusenoj, lito duloka: ĝi mem petas — venu kaj ekkuŝu. Post unu semajno vi estos jam geedzoj; eĉ kantistojn kaj popon mi dungis. En la preĝejo okazos plenlumigo kaj vi portos kronojn, oni disdonos kandelojn kaj vin superŝutos per lupolo. La popo diros gratulojn (speciala pago por tio!).

— La popo? Mi ne bezonas tiun friponon. Senpope mi volas edziĝi. Estu ruĝa geedziĝo!

— Ha, jen kio! — eksiblis ŝi: — sekve ci deziras preni mian Manjon kiel konkubinon malvirgecan de l' naskiĝo? Kaj poste ŝin lasi kune kun farĉo?

Mario ankaŭ protestis kaj pepis tre konvinke:

— Unu fojon en la vivo ni portos kronojn. Kaj mi montros al ĉiuj mian tiomkaran kostumon en plenlumo preĝeja. La tuta vilaĝo krevos pro envio. Ne, mi ne konsentas senpope.

7. Li estas idekonscia homo

Ambaŭ virinoj ploris, ridis, kriis, petis, demandis, respondis, admonis kaj minacis ĝis vespero. Finfine:

— Ĉu ci bolŝeviko fariĝis, babilante kun la or-okula strigo instruita? Malĉastigis li cin, malkristano favoriča.

— Ne boju, panjo! Nek bolŝeviko, nek malĉasta mi estas. Mi simple ne volas ŝovi nazon popan en mian poton. Li iru for kun siaj trompartifikoj. Eksterpartia mi estas, sed homo idekonscia.

La geedziĝo krevis.

8. Post bona regalo okazas rukto

“En nomo de laborist-kampanara registaro mi, distrikta popol-juĝisto, komunikas al vi, Alekso la Multpeka, ke malgraŭ via foresto en juĝprocedo la 1. aŭgusto, mi kune kun popol-skabenoj: Johano la Fiŝokula kaj Petro la Cielenira, decidis: skribpeton de Anna la Pia kontentigi. Sekve vi devas el-pagi al ŝi 70 rublojn, kiujn ŝi elspezis por regalo de viaj svatistoj, ĉar vi provokis la trompaferon.”

(Subskribo).

9. Rajt ĉion instruas

— Nu, kion do vi deziras? Ĉu viaj svatistoj ne formanĝis 70 rublojn? Se vi ilin sendis, pagu por ili kvazaŭ en restoracio. La komerca afero, nenio pli.

— Vi nur mokas min, k-do; helpu, pli bone. La maljunan vidvinon ja la popo instruis, ke ŝi plendu, kaj vi min instruu.

— La popo?

Kaj Rajt ekmarŝis laŭlonge de l'ĉambro.

— Bone. Mi faros por vi petskribon. Sed diru: ĉu ĝis nun Mario plaĉas al vi kaj...

Alekso ŝajnis ruĝa, kiel kapsiko. Li respondis nenion.

Rajt skribis dum unu horo, ne malpli.

10. Gubernia juĝisto konas socisciencon

Post unu monato estis ricevite:

... “Gub. tribunalo atentante, ke

Anna la Pia dum svatistoj-akcepto estis regata de malnova feŭda kutimo, laŭ kiu svatado estas komerc-afero, vendo, ĉar gepatroj de fianĉino estis pagantaj al gepatroj de fianĉo certan sumon, nomatan „doto“; tial ke dot-donantoj havis intereson pri dot-malpliigo — ili ebriiĝis laŭkutime svatistojn.

Soveta Registaro devas kontraŭbatali ĉi-kutimojn, ĉar virino 16-jara kaj viro 18-jara jam rajtas libere elekti viv-kunulon kaj ĉi-elekto ne devas esti komerc-afero.

Tial Gub. Tribunalo nuligas la decidon de l'distrikta juĝisto kaj ĉesigas por ĉiam la procedon“.

11. Jen alia rezolucio (nek skribita, nek eldirita)

... atentante, ke estas

1. regalmono elspezita kaj ne revenebla,

2. la kostumo — jam kudrita,

3. Alekso — bonhava kaj tute ne Multpeka homo,

Anna la Pia decidas:

Mario kaj Alekso estu senpopaj geedzoj.

12. Anonco (sur la pordo preĝeja)

Kiu aĉetas? Pli malkare ol ie ajn!!!

Kalikoj, ikonoj, krucoj ktp.

Hodiaŭ 100% da rabato! Kaptu la okazon!

Noto de la Redakcio

Ĉi tiu humorrakonteto, originale verkita en Esperanto, eatas tre karakteriza por la nuna Soveta moraro. La subjekto de la rakonto estas bazita sur reale okazinta fakto.

Edukado kaj religio¹⁾

Sébastien Faure

Dio kaj la historio de religioj

Tre ofte oni min demandis kian spacon okupas la religiaĵoj en la instruado en “La Ruche”²⁾. Kaj multaj el miaj korespondantoj ŝajnis al mi konvinkitaj, ke niaj infanoj devus esti edukataj en malamo al dio, en malŝato al la kutimoj de l'kulto kaj al la personoj, kiuj sin dediĉis al ĉi-lastaj.

Tiuj-ĉi korespondantoj eraras. Ni mem, ni neniam parolas al niaj infanoj pri dio. Ĉar dio estas en niaj okuloj — mi parolas pri miaj kunlaborantoj kaj mi — hipotezo naskita en epokoj tre malproksimaj de la malklereco kaj de l'timo, poste lerte subtenata, poste perfide ekspluatita de la mastroj por konservi la sklavigitajn kaj prirabitajn popolamasojn sub la jugo kaj en mizero, ni opinias, ke ni ne devas paroli al niaj infanoj pri tia hipotezo, des pli ke ni havas sufiĉe multon farendan, se ni konigos al ili nur la certajojn.

Por oferi tempon al studoj pri fikcio estus necese, ke la studoj pri l'realo lasu al ni libertempon.

La ekzamenado de l'ideo pri dio interopozigis la plej eminentajn filozofojn; sur la suproj de l' penso kaj de l'kono ĝi vekis la plej ardajn kaj la plej profundajn diskutojn; ĝi postulas malsimplajn konojn kaj ĝeneralajn ideojn; tial estus sence proponi ĝin al infanoj.

Homo ne estas “animalo religia”.

Pascal³⁾ — se mi ne eraras — asertis, ke homo estas “animalo religia” kaj multo da pensuloj vidis en la fakto, ke homo kredas kaj preĝas dum bestoj ne kredas kaj ne preĝas, trajton por distingi inter tiuj kaj aliu.

Mi deklaras falsa la aserton de l'Port-Royal'a⁴⁾ filozofo. Homo ne estas animalo religia; li fariĝas tia sub la influo de l'instruado, kiun li ricevas, de l'konversadoj, kiujn li aŭdas, de l'legaĵoj, de l'spektakloj, kiujn donas al li la riprezentantoj de dio kaj de l'pensoj, kiujn sugestias la vido de preĝejoj, temploj, sinagogoj kaj moskeoj.

Se, kiel tion asertas la fama aŭtoro de l'“Pensoj”, homo sentus bezonon kredi, kiel li sentas bezonon trinki, manĝi, dormi, spiri, neniu individuo de l'homspeco liberigus de ĉi-bezono.

Nu, la infanoj de “La Ruche”, nesciantaj kredaĵojn, neniam aŭdantaj parolojn pri dio, ne vidantaj iun religi-praktikadon, neniam intencas meti al si, nek meti al ni demandojn tuŝantajn religion.

1) La tradukaĵo prezentas fragmenton el la verko de l'konata franca anarkisto Sébastien Faure (pron. Sebastjan For) “Propos d'Éducateur” (“Paroloj de Edukisto”). La ĉeftitolo de l'fragmento ne apartenas al la aŭtoro.

2) “La Ruche” (“L'Abelujo”) — edukejo por proletar-infanoj fondita kaj gvidita de Séb. Faure.

3) Blaise Pascal (pron. Blez Paskal) — fama franca filozofo, matematikisto kaj fizikisto da l'XVII a jarcento. Li verkis apologion de kristanismo, eldonitan sub la titolo “Pensées” (“Pensoj”).

4) Port-Royal (pron. Por-Rŭajal) — franca abatejo ekzistinta ĝis 1700. Kaj estinta en a XVII a jarcento centro de l'religi-filozofia movado “jansenismo”, al kiu apertenis Pascal.

Kaj ni opinias, ke nia devo estas ne vekti en ili scivolon, kiun ili eĉ ne kapablas racie kontentigi.

La religioj en la historio

Sed se dio estas nur fikcio, la religia movado okupas en la historio rimarkindan lokon, kaj estus erara kaj danĝera sisteme forigadi el la studoj pri historio ĉion, kio traktas pri religio.

Nu, la historio de l' manifestadoj de religia penso kaj ago dum la jarcentoj estas ja parto de l' ĝenerala historio, kaj ni opinias, ke nur instruante ĉi-lastan estas interese instrui tiun historion.

Trad.

Infanoj kaj religio

W. Drummond

Kvankam la ĉi-suba fragmento estas ĉerpita el verko de burĝa sciencisto (W. Drummond. Enkonduko al la priinfana scienco) kaj pro tio enhavas gravajn metodologiajn mankojn (ekz.: burĝinfano, kiel precipa studobjekto; neatento pri l' socia medio, kiel faktoro formanta la konduton), ĝi estas atentinda pro tio, ke ĝi konstata la fakton, ke infano ne estas pronature religia. Kelkiam scienca objektiveco devigas al verdiro eĉ burĝajn sciencistojn.

Red.

La tezo, ke infanoj estas religiaj pronature, sen ĉia edukado, — ĉi-tezo ŝajnas esti kontestebla. Pro komprenendaj kaŭzoj ni havas nemultajn faktojn, kiuj estus helpintaj al ni formi certan opinionon pri ĉi-temo; estas tamen notinde, ke laŭ la diroj de surdamutuloj ricevintaj edukadon, kvankam ili estis dum la infanaĝo ĉiam kondukataj al diservoj, neniam eĉ ili formiĝis ideo pri la senco de tio, kion ili vidis. Ĉiaokaze estas ekster dubo, ke en tre diferantaj cirkonstancoj infanoj trapasas tre variajn evolufazojn, dum kiuj estas evidente necesaj same variantaj edukmetodoj.

Unu el la plej rimarkataj karakterizaj trajtoj de la religia vivo de malgrandaj infanoj estas ilia kredemo. Havante nulajn sciojn pri ti-kio estas ebla aŭ kredinda, la infanoj tute nature simple akceptas, sen speciale pridemandi, tion, kio estas al ili dirita, kaj ĉio mirakla kaj fantazia nur vekas ilian intereson kaj igas ilin postuli plion, tute ne elvokante dubojn. Filineto de mia amiko estis demandinta sian patrinon pri la detaloj de l' hejma vivo de anĝeloj. La patrino diris, ke bedaŭrinde ŝi ne povas respondi ĉiujn demandojn, ĉar ni fakte scias tre malmulton pri tio, kio okazas en la ĉielo. La knabino estis tre mirigita kaj diris: "Vi ne scias? Kaj la kuiristo ĉion-ĉi scias!"

La dua distingo-trajto estas emo al antropomorfismo. Infano nature interpretas ĉion de ĝi aŭditan per la donoj de sia sperto kaj transformas ĝin je propra mitologio. Dion ĝi prezentas al si kiel grandegan homon, tre altan kaj tre dikan. Li vivas, laŭ la opinio de l' infanoj, sur la ĉielo, super la nuboj, en la luno aŭ en iu stelo. Li estas antaŭ ĉio ti-kio fabrikas objektojn kaj la infano povas esti tre surprizata pro lia lerto kaj forto.

Kiel maldelikate antropomorfaj povas esti la ideoj de infanoj, tion montras ekzemple la jena okazintaĵo: iu infano, vidinte homon laborantan sur

la tegmento, demandis, ĉu tiu ne estas Dio. Plie, iu knabeto (konata al mi) rimarkis foje matene, ke la neĝo, kovrinta ĉion hieraŭ, estas malaperinta; kiam li estis demandinta, kiu forigis la neĝon, oni respondis al li, ke tion faris dio. Baldaŭ post tio estis neĝo, kaj la patrino de l' knabeto invitis iun homon por forbalai la neĝon desur la perono. Fininte sian laboron, ĉi homo estis konfuzita pro la demando de l' knabeto, ĉu li ne estas dio.

Infano tre facile akceptas la ĉion-scion de dio; por ĝi (por la infano) tiu-ĉi ideo signifas nur, ke dio estas iomete pli saĝa ol la ĉion-sciantaj gepatroj. Multe pli da necertesto kaŭzas al infano la instruo pri tio, ke dio estas ĉieestanta, kaj tio povas elvoki demandojn, kiuj ŝajnas tiom amuzigaj al personoj nekomprenantaj ilin. Tiu-ĉi instruo tre facile elvokas eĉ l' infano ideon pri ĉiam observanta okulo kaj pro tio povas kaŭzi malagrablon kaj timon. "Mi ne volas, ke oni min tiel spionu!" — diris iu knabino piedtrapanante, kiam la patrino estis provinta klarigi al ŝi, ke dio estas ĉiam proksima al ni. Alia infano foje staris, plorante, antaŭ pordo de ĉambro kaj timis eniri dum tie estas Dio.

Ne estas malfacile citi sennombrajn ekzemplojn pruvantajn, kiom groteskajn religiajn ideojn formas al si infanoj; sed por kio? Estas sufiĉe klare, ke malgrandaj infanoj inklinas al animismo samkiel sovaĝulo, ke ili estas certa-grade superstiĉemaj, ke ilin forte allogas rakontoj pri ĉio mirakla. Sed tiaj komunaj trajtoj tre varias, dependante de diferantaj temperament-individuecoj. . . Iu sinjorino asertis, ke en la sepjara aĝo ŝi por ĉiam ĉesis kredi je ĉio supernatura en la Evangelio, kaj mi konas du knabojn, kiuj, ekvidinte maldelikatan bildon de Kristo paŝanta sur akvo, tuj konvinkigis, ke tia fakto neniam povis okazi. Ordinara kaŭzo de nekredo dum la infanaĝo estas nericevo de tija kontentigo responde al preĝo. La ĉefsignifo de tiaj fruaj elmontroj de la skeptika racio estas tiu, ke la infanoj inklinas ĉi-okaze kaŝi siajn pensojn, timante, ke la proksimuloj rilatos al aliaj herezaj pensoj malsimpatie.

La nunepoka infano ne povas senti tian dependecon de la naturfortoj, kia estas esprimita en la praformoj de religia adoro, sed ankaŭ eĉ ĝi (eĉ l' infano) ni vidas la saman tendencon personigi la sunon kaj la lunon, la venton kaj pluvon, kaj ĝia amo al fantaziaj fabeloj kaj rakontoj pri diversaj mirakloj montras saman pensmanieron kiel ti-kio estis kreinta la antikvajn mitologiojn. Kaj pro tio ni opinias, ke mitoj, naturhistorio, fabeloj kaj aliaj fantaziaj prezentas per si tre valoran materialon, kiu kapablas plej forte ekflamigi la imagivon kaj ardigi la koron.

Trad.



La eksperimento de senreligia edukado

E. Spiridovič¹⁾

Religia edukado kaj instruado de infanoj en Ukraina Soveta Socialista Respubliko (USSR) estas leĝe malpermesita. Tial edukado kaj instruado de infanoj en infandomoj (orfejoj) de la respubliko donas al ni la plej riĉan sperton rilate al la signifo kaj la rezulto de senreligia edukado.

Sur la paĝoj de ukraina pedagogia gazeto "La vojo de klerigado" d-ro Ĥersonski lokigis artikolon, en kiu li priskribas la eksperimenton de senreligia edukado en la 1. Odesa Infanurbeto, unuiganta 22 infandomojn (pli ol 1600 infanoj).

— "Ĉu oni devas kaj povas igi infanojn sen religia edukado?" — demandas d-ro Ĥersonski: — "religio en sia fundamento estas anstataŭenda de la plej alta moraleco; ĝi estas fondita sur maldelikata egoista principo "do ut des" (mi donas por ke vi donu): mi donos al dio oferon, preĝos al ĝi, kaj ĝi al mi helpos kaj punos miajn malamikojn. Sed en sia moderna evoluo la religiaj principoj, enigitaj en la testamento, — amu proksimulon kiel sin mem — koincidas kun statutoj de homa moralo. Eduki infanojn sen religio, ĉu ne signifas tio lasi ilin morale orfigitaj, sen have de la plej altaj stimuloj al ilia konduto? ĉu ne estos ili ofte konfuziĝintaj dum solvado de problemoj, naskiĝontaj en homa kunvivado?"

Por solvi la problemon d-ro Ĥersonski aranĝis enketon, kiun li efektivigis en 7 infandomoj kaj en kiu partoprenis 69 knaboj kaj 57 knabinoj, entute 126 infanoj.

"Jam antaŭa observado de infana vivo en la Urbeto", — diras Ĥersonski, — "min certigis, ke la infanoj en amaso ne estas religiemaj, pli ĝuste ili estas senreligiaj; oni ne faras kaj opinias nedezirinda apartan kontraŭreligian propagandon, ĉar ĝi fiksis je religieco la atenton de infanoj. Necerteco, ke je rektaj demandoj pri religio oni ĉiam ricevos sinceran respondon, igis formuli la demandojn de la enketo tiel, ke pri la rilato de infanoj al religio oni sciiĝu ne senpere, sed per observado de la edukistoj. La enketon por infanoj mi konstruis tiel, ke mi povu ricevi materialon pri kreskado de infana mondkompreno dum renreligia edukado."

Tiele estis konstruitaj 2 enketoj: por infanoj kaj por edukistoj. Krom tio dorsflanke de ĉiu infana enketo la edukisto devis mallonge karakterizi la infanon. La enketo por infanoj estis jena:

Enketo por infanoj

(komencante de 9-jara aĝo; infanoj enskribas la respondojn propramane)

1. Kial oni devas peni bonfaradi al ĉiuj ĉirkaŭantoj?
2. Kial oni devas ami siajn gepatrojn?
3. Kiamaniere estas distingataj malbona homo kaj la bona?
4. Kiu vi deziras esti en estonto (profesio, socia stato)?
5. Via amata heroo? Kial?

La demandoj de la enketo, kiel vidas la leganto, estas tiel formulitaj, ke "en ĉiu respondo aperu ne nur abstrakta, teoria mondkompreno, sed ke ĉiu respondo enhavu *agon*".

1) K-do E. Spiridovič estas nia kunmembro kaj redaktoro de ĉiumonata ukraina gazeto "La vojo al komunismo" (Шлякго коммунізму).

Kion do respondis la enketo je la demandoj: "ĉu estas formigitaj ĉe la infanoj etikaj idealoj, gvidnormoj de konduto? ĉu la infanoj kreis ion anstataŭ formalaj "diordonoj"?"

La unua demando pri tio, ke al ĉiuj ĉirkaŭantoj oni devas fari bonon, ĉe la infanoj ne elvokas dubojn. Estas nur du respondoj: "mi ne scias". Eĉ unu el ili estas tia: "oni devas al ĉiuj bonfaradi, sed mi ne scias kial". Unu respondo estas jena: "oni devas faradi bonon al ĉiuj".

Respondojn de la plejmulto de l' infanoj oni povas dividi je kelkaj kategorioj:

La unua estas la respondoj de la tipo: "ĉar se ni bonfarados al homoj, ili ankaŭ bonfarados al ni"; "kiam ni maljuniĝos, al ni ankaŭ iu helpos", diras 9-jara knabino.

En la aĝo de 10 jaroj kaj plie fariĝas tipaj jenaj respondoj: "oni devas bonfaradi al ĉiuj ĉirkaŭantoj, por ke ĉiuj estu en amikeco kaj amu unu alian", "por ke al ĉiuj estu bone kaj pro la bono" ktp.

Kaj fine en la aĝo post 13 jaroj la respondoj estas profunde pripensitaj: "ĉar ĉiu prudenta estaĵo devas bonfaradi al ĉirkaŭantoj, sen kio justeco ne estas ebla sur la tero", "ĉar ni deziras forigi ĉiun malbonon", "ĉar ĉiuj ĉirkaŭantoj estas kamaradoj", "en proletaria mondo ne devas esti eĉ iu angulo por malbona homo!"

La dua demando elvokis preskaŭ unutipajn respondojn: "ĉar ili (gepatroj) prizorgas nin", ĉar ili turmentiĝis kaj travivis malfacilan tempon pro ni".

En 5 okazoj oni kritikis la demandon: "oni devas ami gepatrojn nur en tiu okazo, se ili estas por ni bona ekzemplo". Kaj jene skribas la infano, kiu travivis familian tragedion: "estas necese ami nur tiujn gepatrojn, kiuj fariĝis amindaj. Mi ne amas mian patron".

"En la respondoj de l' infanoj al du unuaj demandoj de la enketo, klare formiĝas etika idealo de l' infanoj, profunde materialeca esence, sed atinganta ian altecon, mi dirus — belecon", — notas d-ro Ĥersonski.

La respondoj al la 3-a demando montris, kia estas kriterio, per kiu sin gvidas infanoj por distingi en vivpraktiko bonon kaj malbonon. Vico de la respondoj celas starigi kriterion rilate al socio: "malbona homo estas ti-kiu zorgas nur pri si mem", "bona homo estas ti-kiu laboras", "bona homo laboras kaj lin ĉiuj amas", "malbona homo estas egoisto kaj ne povas vivi en kolektivo".

Ĉi tiuj respondoj per unu fojo enkondukas nin en tiun laborecan atmosferon, en kiu loĝas la infanoj: bona homo estas laboranto, la direktanta stimulo estas bono de kolektivo.

Kaj jen estas la respondo de 12-jara knabo, eksterordinare observema fizionomiisto: "malbona homo havas la brovojn kunkreskiĝintajn super okuloj, la okulojn malbonajn, la voĉon maldelikatan, la harojn malmolajn; la bona havas brovojn nekunkreskiĝintajn, la okulojn bonajn, la voĉon delikatan kaj la harojn molajn".

"Kiu vi deziras esti en estonto?" — respondoj al tiu ĉi kaj al la 5. demandoj kompletigas spiritan fizionomion de infano.

La 4-a demando evidencigas la superregon de laborista idealo ĉe infanoj: 60% da knaboj elektas profesion de kvalifikita laboristo; nur 15% elektas inteligentan laboron. Ĉe la knabinoj ni rimarkas alian korelativon: nur 25% deziras esti laboristinoj; 35% deziras studadi inteligentan laboron kaj liberajn artojn; 15% preparas sin esti "hejmmastrumantinoj".

El inteligentaj profesioj oni montris kuracistan, instruistan, inĝenieran ktp. . . "Mi deziras esti kuracisto, sed min konfuzigas, ke li vendas sian laboron pro mono", skribas unu knabo. Nur du respondoj estis jenaspecaj: "mi deziras esti riĉulino", "mi deziras esti fabrikanto".

Ĉe la infanoj de pli juna grupo okazas fantaziaj respondoj: "mi deziras esti ĉasisto kontraŭ jaguaroj kaj elefantoj en Afriko", "mi deziras esti aviadisto kaj aviadi aeroplano", "mi deziras esti detektivo". Knabino 9 jaraĝa respondas: "mi deziras esti floro".

Laborista idealo estas la tipa por plejmulto de l' infanoj: "mi deziras esti botisto", "seruristo", "honesta laboristo", "klera laboristo, ĉar laboristo devas esti klera", "klera lignajisto kaj honesta laboristo".

Sociaj kaj politikaj simpatioj de l' infanoj evidentiĝis en la respondoj al la demando: "via amata heroo? kial?"

La plejmulto montris la heroojn de la revolucio — Lenin kaj Trocki. Krom ili oni montras vicon de revoluciuloj historiaj: Grakhojn, Spartakon, Garibaldi ktp. . . Ankaŭ oni montras revoluciajn laboristojn odesanojn, konatajn al la infanoj: "avon" Trofimov, Potemkin ktp.

La duan grupon konsistigas literaturaj herooj (ĉi tie estas enkalkulataj aŭtoroj kaj herooj de iliaj verkoj). Literaturaj herooj superregas ĉe la knabinoj. Jen komparaj ciferoj: 42% da knaboj kaj 20% da knabinoj nomis heroojn de revolucio; 30% da knaboj kaj 40% da knabinoj — literaturajn heroojn. Oni nomis diversajn verkistojn, plejparte rusajn klasikulojn Puŝkin, Tolstoj, Krilov kaj al. . . La pli junaj infanoj elektas heroojn el diversaj verkoj: Tom Sojer, knabinon Elzon ktp.

Estas interesaj la motivoj: miaj amataj herooj estas Lenin kaj Trocki, ĉar ili defendas la liberon"; "Lenin, ĉar li estas la heroo de la revolucio, aktiva laboranto kaj zorgas pri bono por ĉiu lando"; "Spartako, ĉar li faris la unuan paŝon al libero kaj ribeligis humiligatajn gladiatorojn"; "avon Trofimov, ĉar li estis laboristo kaj estis kondamnita pro libereco".

Kaj jen originala respondo: "miaj amataj herooj estas laboristo kaj kamparano, ĉar ili kondukas nin al nova vivo".

Tia estas la rezulto de la enketo, entreprenita de d-ro Ĥersonski. La esploro de la respondoj precipe reliefe prezentas tiun laboran atmosferon, en kiu estas edukataj la infanoj.

D-ro Ĥersonski metis la demandon: "Ĉu povas racia senreligia endukado doni al infano necesajn stimulojn de konduto, konformajn al la devigaj normoj de la kunvivado?"

La enketo tre klare respondis: jes.



Ni ankaŭ ricevis de k-do Borrell interesajn karikaturojn de hispana desegnisto Shum, kiu antaŭnelonge estis kondamnita al morto, sed poste indulgita. Estas tre dezirinde akompani tiujn ĉi desegnaĵojn per artikolo. Do ni atendas ĝin.

Al la tradukinto de "Sakja Muni" kaj "Mortanta gladiatoro" ni informas, ke ambaŭ poemoj estis senriproĉe tradukitaj pli frue kaj la nova traduko, estante nesperta provo, kompreneble ne povas rivali al ili. Rilate al "Sankta devizo" — tute ne valoris ĝin traduki pro ĝia enhavo. Ni tamen sincere salutas la k-don en la komenco de lia esp. literatura laboro kaj deziras al li sukcesojn.

La Redakcio.

ĈIU ESPERANTOPAROLANTA LABORISTO

LEGAS LA UNUAN SEMAJNAN

LABORISTAN GAZETON EN ESPERANTO

"SENNACIULO"

POSTULU PROVNUMERON ĈE

ADMINISTRACIO DE S. A. T.

LEIPZIG-STÖTTERITZ, COLMSTRASSE 1

Jarabono al "Sennacieca Revuo"

Argentino 3 pesos; Aŭstrio 35 000 kr.; Belgio 12 fr.; Brazilo 6 milr.; Britio 60 penc.; Bulgario 80 lev.; Ĉekoslovakio 25 kr.; Danio 5 kr.; Estonio 250 mk.; Finnlando 30 mk.; Francio 10 fr. fr.; Germanio 2,50 mk. or.; Hispanio 6 peset.; Hungario 2,50 kr. or.; Italio 12 lir.; Japanio 2 jen.; Jugoslavio 50 din.; Latvio 3,50 lat.; Litovio 5 lid.; Nederlando 3 guld.; Norvegio 7 kr.; Polio 2,50 zlot.; Portugalio 15 esk.; Rumanio 120 lej.; Rusio 1,25 rubl.; Svedio 3 kr.; Svisio 5 fr.; Usono 1,50 dol.

ABONU ĈE ADMINISTREJO:

R. LERCHNER, COLMSTRASSE 1, LEIPZIG-STÖTTERITZ (GERMANIO)

ĈU VI JAM VARBIS NOVAJN ABONANTOJN

POR TIU ĈI LUKSA REVUO?

MULTAJ ĜIN NE KONAS, MULTAJ ĜIN EK-
ABONUS, SE VI MONTRUS ĜIN AL ILI.
SE VI ESTAS KONTENTA PRI VIA REVUO,
ZORGU DO, KE ĜI ESTU LEGATA DE
MULTAJ. NUR TIAM ĜIA PROSPERO
ESTAS GARANTIATA.

MANKAS BELAJ LIBROJ

en nia literaturo,

kvankam ne mankas bonaj manuskriptoj.

Ŝtopu la truojn! — Ebligu la presigon!

Kompletigo de via SAT-biblioteko estas
via afero!

PROVIZU VIN PER LA AKCIOJ DE ELDONKOOPERATIVO DE SAT

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda

Fondita en 1919

Literaturo-Scienco-Pedagogio

ENHAVO:

ST. LILJANOV: La Sekretoj de Danubo. Trad. Stebek. —
La blanka venĝo. Elrusigis Vi. Kuzmič. — *CYPRJAN*
NORWID: La forto de ili. Vers. Trad. 2798. — *L. IVN*:
Maldungo. Vers. — *HENRIKO SEPPIK*: Ha-ha-ha! —
A. GASTEV: Ni iras. Elrusigis Nik. Vladimirovič. —
R. TORGEIRSON: Nia propra tago. Vers. Trad. D. S.
— *H. F. SPAK*: Kamarada kanto. Vers. Trad. D. S. —
G. P. DE BRUIN: Nederlanda verkisto Multatuli. —
N. LENIN: Tri fontoj kaj tri konsistpartoj de l' Marksismo. Trad. V. K. — *G. REIMANN*: Ventoŝipo sen veloj.
— *P. BLONSKI*: La socio kaj la lernejo de estonto. El-
rusigis G. P.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (Rusio)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)